


# Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

37a jarkolekto, aŭgusto-septembro 2016/08-09



**Forpasis Paul Gubbins,  
ĉefredaktoro de MONATO**

**Kvin jarojn post Fukuŝimo**

**Britio  
post la eliro**



# TREVOR STEELE

# DIO NE HAVAS EKLEZION



Bruce Golding estas internacie konata foto-ĵurnalisto, kies specialaĵo estas batalarenoj kaj lokoj de naturkatastrofoj. Li fieras pri sia reputacio de “ŝtalulo”. Sed sur Hakilule, insulo grandparte detruita de cunamo, li trovas, ke estas limoj de lia “ŝtala karaktero”. Lia soleca koro trovas ankaŭ amon tie, kaj li komencas ŝanĝi sian mornan viv-percepton.

Bruce ekscias, ke senskrupula korporacio ekspluatas la katastrofon por aneksi la insulon kaj konverti ĝin en feriejon por riĉegaj turistoj, tiel detruante la harmonian kaj mediprotektan vivstilon de la insulanoj. Ĉu li povas ion fari por helpi tiujn pacemajn homojn?

Eldonjaro 2015.

Tradicia bindita versio, formato 140 x 205 mm, 168 paĝoj. ISBN: 978 9077066 54 6;

prezo ĉe FEL: 11,40 eŭroj + afranko.

Kiel bitlibro (ePub, Mobi aŭ PDF) prezo ĉe FEL: 6,90 eŭroj.

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.



MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 37a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande (vidu p. 4).

MONATO havas 126 korespondantojn kun kunlaborkontrakto en 43 landoj kaj abonantojn en 68 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaj artikoloj (ne tradukoj); presoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; MONATO estas eldonata en tradicia papera versio kaj elektronike en la formoj PDF kaj ePub; krome aperas ĉe eldonejo por blinduloj kaseda versio kaj elektronika versio en la formo MPD; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de la eldonejo.

## eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo,  
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen,  
Belgio; telefono: +32 3 234 34 00,  
retpoŝto: monato@fel.esperanto.be,  
valida anonctarifo: n-ro 9;  
kompostita kaj vinktitata  
en la eldonejo.

## retejo:

www.monato.net



## sociaj retejoj:

- Twitter: @FEL\_Antwerpeno
- Facebook:  
http://eo-eo.facebook.com/revuo.  
Monato
- Ipernity: http://flandra\_esperanto-ligo.ipernity.com

## honora ĉefredaktoro:

Stefan Maul.

## ĉefredaktoro:

Paul Gubbins †.  
Rete: chefredaktoro@monato.net.

## reviziantoj:

Roland Cuenot, Edmund Grimley  
Evans, Jens S. Larsen, Rob Moer-  
beek, Brian Moon, Anna kaj Mati  
Pentus, Alexander Shlafer.

## redakcia sekretario:

Paul Peeraerts.  
Rete: redakcio@monato.net.

## grafiko:

Ferriol Macip.

## redaktoroj:

► **Arto:** Claude Nourmont-Moon,  
2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim,  
Luksemburgo.  
Rete: arto@monato.net.

► **Ekonomio:** Roland Rotsaert,  
Marie Popelinplantsoen 3 - bus  
0402, B-8000 Brugge, Belgio.  
Rete: ekonomio@monato.net.

► **Eseoj:** Sendu al la koncerna re-  
daktoro, depende de la temo.

► **Hobio:** Evgeni Georgiev, Por-  
zellangasse 25/41, A-1090 Vieno,  
Aŭstrio. Rete: hobio@monato.net.

► **Komputado:** Edmund Grimley  
Evans,  
2 Comfrey Court, Cambridge, Britio  
CB1 9YJ.  
Rete: komputado@monato.net.

► **Leteroj:** MONATO, Frankrijklei  
140, 2000 Antwerpen, Belgio.  
Rete: leteroj@monato.net.

► **Libroj:** Boris Kolker, 6755 May-  
field Rd, Apt 312, Cleveland, OH  
44124,  
Usono. Telefono 440-646-1482.  
Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librecozojn oni ne sendu  
al la redaktoro proprainciate.  
La kunlaborantoj ricevos la librojn  
kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

► **Lingvo:** Roberto Pigro, Griva  
Digeni 1A (St Mary's), CY-3031  
Limassol,  
Kipro. Rete: lingvo@monato.net.

► **Medio:** Sendu viajn kontribuojn  
al medio@monato.net.

► **Moderna vivo:** Sendu viajn kon-  
tribuojn al moderna\_vivo@monato.  
net.

► **Noveloj kaj Poezio:** Sendu viajn  
kontribuojn al noveloj@monato.  
net.

► **Politiko:** Sendu viajn kontribuojn  
al politiko@monato.net.

► **Scienco:** Roberto Pigro, Griva  
Digeni 1A, St Mary's, CY-3031 Limas-  
sol, Kipro. Rete: scienco@monato.  
net.

► **Spirita vivo:** Gerrit Berveling  
Van Vredenburchweg 435,  
2284 TA Rijswijk, Nederlando  
+70-213 4914  
Rete: spirita\_vivo@monato.net.

► **Turismo:** Evgeni Georgiev,  
Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno,  
Aŭstrio. Rete: turismo@monato.net.

Verantw. uitgever: Vlaamse Espe-  
ranto-bond v.z.w., Frankrijklei 140,  
B-2000 Antwerpen.

## politiko

BRITIO .....	10
Turbulaj tempoj	
La referendumo: Kiel voĉdonis la britaj esperantistoj?	
OPINIO .....	12
Malfidindas publikaj informoj	
KROATIO .....	13
Piedpilko politika	
ALBANIO .....	14
Malnovaj argumentoj de novaj registaroj	

## moderna vivo

GERMANIO .....	15
De princoj al paco	
AŬSTRIO .....	17
Ŝtala tegmento por fera vojo	
JAPANIO .....	18
Kvin jarojn post Fukuŝimo	
TERTREMOJ .....	20
Kiam mankas akvo, elektro kaj manĝaĵoj	
IRLANDO .....	22
Malsekreta sekreto	
KUBO .....	23
Mirinda novaĵo	
SLOVAKIO .....	24
Kuraĝa verkisto	
JAPANIO .....	25
Strigo-kafejo	

## turismo

LITOVIO .....	26
Vojo tra arbopintoj	

## lingvo

REFORMO .....	28
Disigas Francion reviziita ortografio	

## scienco

ITALIO .....	30
„Evolvis“ papirus-rulojn teamo de fakuloj	

## literaturo

ANTAŬ CENT JAROJ .....	31
Verko graveda de vortmagio	

## eseo

EKONOMIO .....	32
Krizo ne komprenita	
SOCIO .....	34
Naciismo kaj patriotismo	

► Abonoj .....	4
► El mia vidpunkto .....	5
► Leteroj .....	6
► Noticoj .....	9
► Anoncetoj .....	35

# KIEL PAGI VIAN ABONON DE MONATO?

v.16-08

## Rekte al la eldonoj ...

- > Per via FEL-konto.
- > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- > Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be).
- > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- > Per PayPal al [financo@fel.esperanto.be](mailto:financo@fel.esperanto.be).
- > Per bankĉeko tratita je **belga** banko en **eŭroj**. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

## Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	32	35	19,20	6	9
Aŭstralio	AUD	88	93	52,80	9,60	15
Aŭstrio	EUR	55	59	33	6	9
Belgio	EUR	55	65	33	6	9
Bosnio-Herc.	EUR	32	35	19,20	6	9
Brazilo	EUR	32	35	19,20	6	9
Britio	GBP	46	49	27,60	5	8
Bulgario	EUR	32	35	19,20	6	9
Ĉeĥio	EUR	46	49	27,60	6	9
Danio	DKK	410	440	246	45	67
Estonio	EUR	37	40	22,20	6	9
Finnlando	EUR	55	59	33	6	9
Francio	EUR	55	59	33	6	9
Germanio	EUR	55	59	33	6	9
Grekio	EUR	55	59	33	6	9
Hispanio	EUR	55	59	33	6	9
Hungario	HUF	11600	12500	7200	1900	2800
Irlando	EUR	55	59	33	6	9
Islando	EUR	55	59	33	6	9
Israelo	EUR	49	52	29,40	6	9
Italio	EUR	55	59	33	6	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1230
Kanado	CAD	82	85	49,20	9	14
Kipro	EUR	46	49	27,60	6	9
Koreio	EUR	49	52	29,40	6	9
Kostariko	EUR	32	35	19,20	6	9
Kroatio	EUR	37	40	22,20	6	9
Latvio	EUR	37	40	22,20	6	9
Litovio	EUR	37	40	22,20	6	9
Luksemburgo	EUR	55	59	33	6	9
Malto	EUR	46	49	27,60	6	9
Nederlando	EUR	55	59	33	6	9
Norvegio	NOK	510	540	300	56	83
Nov-Zelando	NZD	105	111	63	11,50	18
Pollando	PLZ	155	170	93	25	38
Portugalio	EUR	49	52	29,40	6	9
Rusio	EUR	32	35	19,20	6	9
Serbio	EUR	32	35	19,20	6	9
Slovakio	EUR	37	40	22,20	6	9
Slovenio	EUR	46	49	27,60	6	9
Sud-Afriko	EUR	49	52	29,40	6	9
Svedio	SEK	520	550	312	57	85
Svislando	CHF	82	88	49,20	9	14
Usono	USD	78	82	46,80	8	13

## aŭ pere de peranto ...

- > **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: [aon.913548977@aon.at](mailto:aon.913548977@aon.at).
- > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (IBAN BE66 0000 2653 3843). Reto: [financo@fel.esperanto.be](mailto:financo@fel.esperanto.be).
- > **Bosnia kaj Hercegovina:** Esperanto-Ligo, Kralja Tvrtka 19 (Pĉ. 452), 71000 Sarajevo. Konto: 338-900-220-635-2698 Reto: [info@esperanto.ba](mailto:info@esperanto.ba).
- > **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 301/303, Brasília (DF) 70393-902, [bel-abonservo@esperanto.org.br](mailto:bel-abonservo@esperanto.org.br).
- > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE, Britio. Reto: [eab@esperanto.org.uk](mailto:eab@esperanto.org.uk).
- > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady III. Tel. 325 615 651. Konto: Postovní sporitelna n-ro 231 798 902/0300, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: [polnicky@quick.cz](mailto:polnicky@quick.cz).
- > **Ĉina:** Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jingchuan-Xian, Jinqiao Touzi Gongs, Pingliang GANSU, 744300 Ĉinio. Reto: [trezoro@qq.com](mailto:trezoro@qq.com).
- > **Dana:** Revuservo de DEA, Arne Casper, Bryggergangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: [arnecasper@yahoo.com](mailto:arnecasper@yahoo.com).
- > **Estona:** Ahto Siimson, Kastani vk.12-11, Paikuse alev, Pärnu maakond, EE-86602. Reto: [ahto.siiimson@esperanto.ee](mailto:ahto.siiimson@esperanto.ee).
- > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: [eoaficejo@esperanto.fi](mailto:eoaficejo@esperanto.fi).
- > **Franca:** Esperanto France, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (iban FRP76 4255 9000 0941 0200 1388 731 bic CCOPFRPPXXX ). Reto: [info@esperanto-france.org](mailto:info@esperanto-france.org).
- > **Germana:** Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: [wolfgang.schwanzer@esperanto.de](mailto:wolfgang.schwanzer@esperanto.de).
- > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08204 Sabadell (Caixa d'Enginyers, IBAN ES54 3025 0001 1514 3339 8158). Reto: [v.sole@esperanto.cat](mailto:v.sole@esperanto.cat).
- > **Hungara:** Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. II/209. Poŝtkest-adreso: HU-1368 Budapest, Pĉ. 193. Tel.: 36/70/932-7465, 36/70/932-7464. Reto: [hungario@gmail.com](mailto:hungario@gmail.com), [www.esperantohea.hu](http://www.esperantohea.hu).
- > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Reto: [noviresp@eircom.net](mailto:noviresp@eircom.net).
- > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-121 Reykjavík. Reto: [esperant@ismennt.is](mailto:esperant@ismennt.is).
- > **Israela:** Jehošua Tilleman, 97-A Dereh-Akko, IL-2637324 Kirjat Mockin. Rete: [b48705544@013.net](mailto:b48705544@013.net). Telephone: (04) 8 70 55 44.
- > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: [feisegreteria@esperanto.it](mailto:feisegreteria@esperanto.it).
- > **Japania:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio, JP-162-0042, [esperanto@jei.or.jp](mailto:esperanto@jei.or.jp).
- > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a Raymond Brisebois, kasisto, 414-110 Grand Ave. London, ON N6C 1L8, Canada N6E 3L4. Reto: [rjlbc@yahoo.ca](mailto:rjlbc@yahoo.ca).
- > **Korea:** Korea Esperanto-Asocio Gangbyeon hansin core B/D, 1601 ho, 350 Mapo-dong Mapo-gu, Seoul 121-703 Koreio. Rete: [kea@saluton.net](mailto:kea@saluton.net).
- > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 606-1250, Escazú. Reto: [miaumiau@ice.co.cr](mailto:miaumiau@ice.co.cr).
- > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: [marija.belosevic@zg.t-com.hr](mailto:marija.belosevic@zg.t-com.hr).
- > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Poŝtel.: +371 26407174. Reto: [margarita.zelve@gmail.com](mailto:margarita.zelve@gmail.com).
- > **Litova:** Laimius Stražnickas, LEA, a.k.178, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: [laimiuslt@gmail.com](mailto:laimiuslt@gmail.com).
- > **Luksemburga:** LEA, 2, om Kleappchen, 5682 Dalheim (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111 0089 3612 0000). Reto: [brian.moon@gmx.com](mailto:brian.moon@gmx.com).
- > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: [uea@co.uea.org](mailto:uea@co.uea.org).
- > **Norvegia:** Anne Karin Bondhus, Morenefare 8 A, 4340 Bryne. Rete: [akbondhus@jkn.no](mailto:akbondhus@jkn.no).
- > **Nov-Zelanda:** David Dewar, PO Box 35-849 Browns Bay, Auckland 0753 Nov-Zelando. Reto: [gddewar@ihug.co.nz](mailto:gddewar@ihug.co.nz).
- > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: [dankaleyk@gmail.com](mailto:dankaleyk@gmail.com).
- > **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio, R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239 Lisboa. Reto: [portugala@esperanto.web.pt](mailto:portugala@esperanto.web.pt).
- > **Ruslandaj:** Halina Gorecka, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando. Reto: [sezonoj@kanet.ru](mailto:sezonoj@kanet.ru).
- > Mikaelo Ĉertilov, Titova, 6-24, RU-606211 Lisko-vo, Nijhegorodskaja obl., Rusio. Tel.: (929)0452654. Banko: "Raiffeisen bank", konto N.: 40817810801000989447. Reto: [mikaelo.che@gmail.com](mailto:mikaelo.che@gmail.com).
- > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, 18000 Niš, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: [zciric2@gmail.com](mailto:zciric2@gmail.com).
- > **Slovaka:** Stano Marček, Zvolenská 15/11, SK-3601 Martin. Reto: [stano.marcek@gmail.com](mailto:stano.marcek@gmail.com).
- > **Slovenaj:** Višnja Branković, Via Parini 5, I-34129 Trieste. Reto: [visnja.brankovic@os.tinet.hr](mailto:visnja.brankovic@os.tinet.hr).
- > Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: [marija.belosevic@zg.t-com.hr](mailto:marija.belosevic@zg.t-com.hr).
- > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, C2 Plaza Hill, 3 Bower Road, Wynberg, 7800. Reto: [beckford@telkomsa.net](mailto:beckford@telkomsa.net).
- > **Sveda:** Sveda Esperanto-Federacio, Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, LGH 1303, SE-931 38 Skellefteå, Svedio. Reto: [leif.holmlund@telia.com](mailto:leif.holmlund@telia.com).
- > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: [ch\\_scheidegger@bluewin.ch](mailto:ch_scheidegger@bluewin.ch).
- > **Usona:** ELNA, 1500 Park Ave, STE 134, Emeryville, CA 94608. Tel.: +1 510 653 0998, Faksno: +1 510 653 1468. Reto: [usa@esperanto-usa.org](mailto:usa@esperanto-usa.org).



## KARA EŬROPO ...

**Paul GUBBINS**

ĉefredaktoro de MONATO



a ŭ prefere, eble, Eŭropa Unio ... ne kredu, mi petas, ke ni britoj vin malamas. Jes, tiel ŝajnas, post la referendumo decido de la brita popolo disiĝi de vi. Ofendite (tamen vi ne povas rezisti al iom da malica ĝojo), vi povas prave atentigi pri la 52 % da britaj voĉdonintoj, kiuj apogis apartigon.

Tamen bonvolu memori, kara Eŭropo, ke tio ne estas plimulto de la popolo. Volis resti 48 % de la voĉdonintoj ... kaj, malgraŭ tio, ke pli da homoj partoprenis en la referendumo ol dum naciaj elektoj, nur 73 % de la popolo fakte voĉdonis. Tio signifas, ke la fatala decido ĝisi, adiaŭi, restis en la manoj, aŭ la balotiloj, de nur 37 % de la popolo.

**Sed provu memori, dum britoj forfloros ne en sendependecon (ne eblas en la nuna mondo) tamen en izolitecon, ke plejparte ne kontraŭ vi ni voĉdonis, sed kontraŭ ni mem.**

Memorindas ankaŭ, ke la referendumo ne temis pri vi. Almenaŭ ne tute. Certe, sur la balotilo, nepris respondi, ĉu resti, ĉu ne resti. Sed efektive vi ludis nur fonan rolon, aparte en la du semajnoj antaŭ la referendumo. Pli gravis, laŭ opinio-sondoj, enmigrado, timoj pri (subtekste) *Lebensraum*, do pri vivo-spaco en lando argumenteble tro plenŝtopita por akcepti pliajn (ne-britajn) alvenantojn.

Do la popolo (mis)uzis vin, kun bedaŭrindaj sekvoj certe por ni, verŝajne ankaŭ por vi, por pugnobati politikan establon, kiu promesis limigi enmigradon, malsukcesis, kaj, pli funde, ĝin socie kaj ekonomie perfidas.

Krome britoj nur nebule komprenis, kial ili voĉdonis. La vesperon antaŭ la referendumo mi staris ĉe superbazara kaso. La kasistino, virino ĉ. 60-jaraĝa, demandis, kien mi metos mian morgaŭan balotilan krucon: ĉu por, ĉu kontraŭ. Mi diris, ke por, kaj demandis, kial ŝi volas scii. La kompatindulo diris, ke la referendumo-debato ŝin tiom perpleksigas, ke ŝi petas la opiniojn de klientoj por helpi al ŝi findecidi.



PAUL GUBBINS

*Tiu, kiu per granda afiŝo postulanta, ke britoj rehavigu sian patrujon, trovos, ke la du importitaj aŭtoj ekster sia hejmo kostos pli pro la postreferenduma ŝanĝo en la valoro de la brita pundo.*

*Multe pli maloftis, kaj modestis, afiŝoj indikantaj subtenon por resti en Eŭropa Unio.*



PAUL GUBBINS

Imagu, semajnoj da debatado, da intervjuoj en radio kaj televido, da gazetaraj komentarioj, da oficialaj registaraj bultenoj dissenditaj al ĉiuj hejmoj, lasis ŝin perpleksa. Ne helpis mensogoj, ke ekzemple la pli ol 400 milionoj da eŭroj semajne senditaj al Bruseloj (en si mem troigo) estos direktataj al grincanta sanservo - promeso tuj post la referendumo neita.

Verŝajne mia amikino ĉe la superbazara kaso, kiel milionoj da aliaj perpleksitaj britoj, voĉdonis malpli kontraŭ vi, Eŭropo (kaj nun, laŭ opinio-sondoj, milionope bedaŭras), sed pli kontraŭ la politikistoj, kontraŭ la politika ordo, kiuj la popolon prifajfas.

Stagnas salajroj (sed male tiuj de bankistoj, kaj aliaj), fermiĝas bibliotekoj, naĝejoj, lokaj sociaj servoj, ŝanceliĝas la nacia sanservo (pro drasta registara ŝpar-reĝimo, kiu ne rekonas, ekzemple, ke popolo maljuniĝanta bezonos pli da subteno, ne malpli) ... kaj do, kiam viaj malamikoj sirenvocĉe avertis, ke aliĝos al vi Turkio (ĉu tion vi sciis, Eŭropo?) kaj ke pli ol 70 milionoj da turkoj povos alveni al Britio, kaj forŝteli laborlokojn, loĝejojn, kaj eĉ pli impliki la sanservon, panikiĝis la popolo.

Propekan kapron ĝi deziris, ion por kulpigi, por puni, pro socio ne fremde-brusele, sed hejme-londone rompita ... kaj tagon post tago preparis la buĉadon de la kapro la dekstrema, bulvarda gazetaro.

Do britoj, laŭ refrenaĵo (refrenezaĵo?) de la referendumo-kampanjo, „reprenis sian landon“. Kien ili ĝin prenis, estas alia demando ... certe ne en la estontecon kaj provizore en politikan kaj financan ĥaoson. Evidentas samtempe nacio funde fendita inter breksiĝintoj kaj nebreksiĝintoj: Anglio kaj Kimrio kontraŭ Skotlando kaj Norda Irlando, kamparo kontraŭ urbo (kun kelkaj esceptoj), maljunuloj kontraŭ junuloj, baze edukitaj kontraŭ alte edukitaj homoj, eĉ familiano kontraŭ familiano.

Ni ambaŭ viktimiĝis, kara Eŭropo, vi kaj mi. Sed provu memori, dum britoj forfloros ne en sendependecon (ne eblas en la nuna mondo) tamen en izolitecon, ke plejparte ne kontraŭ vi ni voĉdonis, sed kontraŭ ni mem.

Kaj ke milionoj da britoj, aparte junaj, daŭre respektas la idealojn, sur kiuj vi staras, kaj, malgraŭ ĉio, volas ilin kune, amike, flegi kaj firmigi.

Sincere via,

Paul GUBBINS

**Jen la lasta kontribuo de nia ĉefredaktoro, verkita tuj antaŭ lia morto, kvazaŭ testamente, pri la komuna Eŭropo, kiun li tiel forte alstrebis.**

# ŜOKO PRO PERDO

„Ankaŭ mi ne komprenis lin,” diris Paul, kaj mi tre miris. Ni sidis sur la teraso de la vilaĝa gastejo de Barlastono. Ĉiun vesperon, post kursoj kaj manĝado, mi promenis de la somerlernejo tien kaj trinkis bonan anglan bieron.

Tiun vesperon Paul Gubbins, gvidanto de la somerlernejo, akompanis min kaj ni kune observis maljunulojn, kiuj sur herbejo antaŭ ni celebris iun ludon kun globoj, kiun ni ambaŭ ne konis. Unu el la grizharuloj ĉiun fojon poste pasis ĉe mi kaj afable parolis al la fremdulo; mi kun miaj rudimentaj scioj de la angla povis nur ĝentile rideti. Sed nun mi ja esperis, ke Paul povos klarigi al mi, kion li diris. Sed li, instruisto en brita universitato, devis konfesi, ke li ne komprenas la krudan dialekton de la samlingvano. „Sed vi ja daŭre respondis per yes al li,” mi insistis. Nu jes, li aktoritis komprene. Ni kore ridis poste ...

Ofte mi rakontis tiun amuzan epizodon, kiam temis pri la „facila” angla lingvo kaj rikoltis miran nekredemon, sed ja estis vere. Tiutempe ni jam delonge estis amikoj kaj mi sciis pri pluraj liaj talentoj; dum la somerlernejo mi spertis krome lian kapablon organizi kaj realigi planojn, por la unua fojo mi spektis lin aktori en skeĉoj. Gubbins estis ne nur bonega ĵurnalisto sed ankaŭ brila dramverkisto (kiom da premioj li gajnis!) kaj lerta instruisto.

Kiam en 1991 mi elektiĝis prezidanto de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEJA), mi petis lin kunlabori. Li estis dum la tuta tempo vicprezidanto kaj, precipe grave, gvidis modele nian korespondan kurson pri ĵurnalismo, per kiu ne malmultaj

akiris diplomon. Alia grava kunlaboro estis liaj kontribuoj por la Deklingva Manlibro pri Politiko.

Bedaŭrinde ni ne tre ofte renkontiĝis persone, ĉar liaj devoj en la universitato kutime ne kongruis kun la datoj de Universala Kongreso, sed ĉiam serioze kaj amuze interparolis kaj multe ridis, ĉar ni havis similan humuron.

Konscia pri ĉiuj liaj kapabloj kaj talentoj, mi kompreneble tuj pensis pri Paul Gubbins, kiam antaŭ mia 70-jariĝo mi planis demisii kiel ĉefredaktoro de MONATO. Je miaj grandaj kontento kaj ĝojo li jesis mian demandon. Pri liaj jaroj kiel ĉefredaktoro mi ne devas informi, ĉar tion niaj legantoj ja scias. Ke li povis plenumi tiun taskon nur ses jarojn, tion certe neniu el ni supozis. Neeviteble min ŝokis la informo pri lia multe tro frua morto.

Mian kondolencon mi direktas ne nur al lia familio, lia edzino Anne, lia filo kaj bofilino Richard kaj Lou, lia filino kaj bofilino Jill kaj Dan kun la nepo Edward kaj al liaj geamikoj, sed bedaŭrinde la malĝojo trafas ja ankaŭ ĉiujn legantojn kaj kunlaborantojn de MONATO, kiuj perdas brilan ĵurnaliston.

Ni ĉiam danke konservos lin en nia memoro.

.....  
**Stefan MAUL**

honora ĉefredaktoro  
de MONATO



Paul Gubbins kun la nepo Edward

## Paul Gubbins

En dormo li mortis,  
surprize kaj pace,  
eble songante pri neverkitaj verkoj.

Amiko de plej multaj,  
ĉiam ronde sprita, humurplena,  
kun afabla rideto tutvizaĝe.  
Mi memoros lin kiel lastfoje, kun supla sunĉapelo  
laŭreklame faldebla poŝen  
kaj elfekebla sendifekta se elefanto ĝin digestis.

.....  
Jorge CAMACHO

## Kial ili forĵetas sian vivon? (2)

Trevor Steele kaj Ali Asghar Kousari jam donis sian opinion pri la teroristoj, kiuj eksplodigas sin (MONATO 2016/06 p. 6). La vera, fundamenta kaŭzo de tiaj bedaŭrindaj kaj nuntempaj frenezaĵoj estas la ignoro de la „senmorteco de nia spirita esenco“. Nia pludaŭrado post la tombo jam estas science pruvita, ne per medioj kiel en Brazilo kaj alie, sed per elektronikaj aparatoj en Eŭropo. Sed homoj ne volas scii, atenti pri tio. La sekvoj estas „kosme“ gravaj por nia estanta kaj estonta vivo. Krom havi siajn apartajn verojn religiajn, filozofiajn ktp, la homoj nepre konatiĝu detale kun tiu Realo, por plia feliĉo surtera.

Mauricio Monken Gomes  
Brazilo

## Lingvaj misaĵoj

Mi rimarkis en la junia numero (Monato 2016/06, p. 23-24) lingvan misaĵon, pri kiu indas atentigi eĉ postfakte: En la artikolo pri parolado de papagoj estas diskuto pri „trejnado“ de tiuj birdoj – sed en Esperanto tia ekzercado nomiĝas „dresado“. Anglalingve temas pri la

sama vorto train, sed ŝajnas al mi, ke nialingva distingo inter „trejni“ kaj „dresi“ estas konservinda.

Cetere, alia strangaĵo en la sama numero: „blankunga kankro“ (p. 17), dum kankroj evidente ne havas ungojn. Anstataŭ la angla white-clawed estus preferinde gvidiĝi laŭ la scienca nomo pallipes, kio tradukeblas per „palpieda“.

Brian Moon  
Luksemburgo

## Mankas traduko

Kun granda intereso mi tralegis la artikolon de Roberto Pigro pri la birdoj, precipe papagoj, kiuj povas sukcese prononci vortojn kaj perparole interagadi kun homo (Monato 2016/06, p. 23-24). Laŭ mia opinio tre bone verkita artikolo, kiu funde informas la legantojn pri la kialoj, pro kiuj papagoj parolas kaj havas sian lingvaĵon.

Estas uzataj la sciencaj nomoj de birdoj, kiuj estas bone konataj nur de ornitologoj kaj zoologoj. Esperanto estas simpla kaj genia lingvo kaj pro tio, laŭ mia opinio, la sciencaj nomoj povus esti tradukitaj en Esperanton, ekzemple: Psittacus erithacus (griza papago), Nymphicus hollandicus (holanda nimfiko/kakatuo),

Calyptorhynchus latirostris (Larĝbeka kaliptorniko aŭ larĝbeka nigra kakatuo), Menura alberti (Albert-menuro) ktp.

Julius Hauser  
Slovakio

## Ĉu spirituala?

En la recenzo pri la disko Karma (Monato 2016, p. 26) trafis min la titolo Spiritisma nova epoko, ĉar ja tute ne temas pri spiritismo. Oni celas specon de muziko, laŭ la recenzanto parenca al New Age. Nu, laŭ mi Esperanto nepre ne plu povas malhavi vorton por indiki aferojn iel ligitajn al spirito, sed ne en senco spiritisma: en PIV por tio oni renkontas „spiritualismo“, eĉ la difino taŭgas. Do kial ne retroderivi el ĝi nian bezonatan „spirituala“?

Gerrit Berveling  
Nederlando

## Sovaĝa tragedio

La raporto pri la sovaĝa tragedio en Barato (MONATO 2016/06, p. 8-10) estas korŝira. En la fono de tiu diskriminacio estas reganta religio. La nomo de Ambedkar rememorigas al mi la his-

torian eventon, laŭ kiu li konvertis sin kaj ĉirkaŭ 500 000 siajn subtenantojn al budhismo.

Isikawa Takasi  
Japanio

## Aŭtoro sendefenda?

Pri du leteroj de Wolfram Rohloff en Monato 2016/06: Atribui al mi „Onidirojn kaj gravajn erarojn“, tio povas detruiri la fidon al la aŭtoro. Relegante la artikolon, mi konstatis nenion ŝanĝendan, nur la Mondaj Heredaĵoj kreskis intertempe de ses al naŭ. Mi kun mia edzino ankaŭ por tiu artikolo estis surloke kaj precize esploris mem la aferojn. Kaj ni fotas mem kaj ne sendas interretaĵojn. Iritas min, ke la redakcio elektis tiun martelan titolon. Ĝin mi demandas, ĉu mi estu sendefenda kiel la nunaj defendopreĝejoj? La kritikanton, pastoro, mi sendas al lia Biblio: Admonu vin reciproke – humile!

Due Wolfram Rohloff kritikis (sen mia nomo) miajn „opiniojn“. Mi ne opinias, sed certakaze deduktas laŭ klare indikitaj kriterioj. Estas la redakcio, kiu ŝovas tion fojfoje al la rubriko „Opinio“.

Franz-Georg Rössler  
Germanio



La rubriko „Leteroj“ estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de abonantoj pri aktualaĵoj kaj pri artikoloj aperintaj en Monato. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado. Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la ciferecaj versioj de Monato. Leteroj por publikigo estu senditaj al [leteroj@monato.net](mailto:leteroj@monato.net).



# Bronzaj bustoj

En la ŝtata universitato de Ĥarkivo, Ukrainio, fondita en 1705, komenciĝis la karieroj de tri Nobel-premiitoj, kiujn la urbo lastatempe honoris per bronzaj bustoj sur piedestaloj tri metrojn altaj.

En la universitato instruis la fondinto de teoria fiziko, Leo Landau, kaj tie studis la ekonomikisto Sajmon Kuznec kaj la biologo Ilja Meĉnikov, ankaŭ aliloke en la urbo monumente honorata. La monumentoj akordiĝas kun la planoj de la urbo tiel rememori eminentajn sciencistojn, kiuj asociiĝis kun Ĥarkivo.

**Dmitrij CIBULEVSKIJ**



Tri eminentaj sciencistoj – tri prestiĝaj monumentoj.

# Bona novaĵo por artistoj

Pliboniĝos la vivo- kaj labor-kondiĉoj de artistoj, laŭ leĝo alprenita en junio de la togolanda parlamento. Prezenti la leĝo-projekton la ministro pri komunikado, kulturo, sportoj, junularo kaj civila edukado, Guy Madzé Lorenzo.

Li emfazis, ke la nova leĝo ebligas „valorigi artajn kaj kulturajn potencialojn, por ke la kulturo iĝu ne nur identiga esprimo de nia popolo kaj motoro de socia kohereco,

sed ankaŭ ekonomia kreskigilo per laboronaj kulturaj entreprenoj.”

Aldonis la 4a vicprezidanto de la Nacia Asembleo, Etienne Baritsè: „Tiu ĉi leĝo donos pliajn respondojn al la problemoj, kiujn la aktoroj hodiaŭ alfrontas.”

La leĝo kondukos al profesiigo de artistoj kaj, kreante laborpostenojn, kontribuos al la celata daŭripova evoluo.

**Adjévi ADJÉ**

# Arboj de la jaro

Sukceson rikoltis hungara kverko ĉe la konkurso *Eŭropa arbo de la jaro 2016*. La duan lokon atingis ĉeĥa jar-mila tilio kaj la trian lokon ducent-jara pirarbo el Slovakio.

La unua premio valoris 560 eŭrojn. Balotis 230 000 homoj el la tuta Eŭropo. La konkurso, lanĉita en 2011, volas atentigi pri arboj kiel grava naturriĉaĵo. Gravas ne beleco, grandeco aŭ aĝo, sed la historio de la arbo rilate al homoj.

**Julius HAUSER**



LAURA MORGAN

BRITIO

# TURBULAJ TEMPOJ

**K**elkajn horojn post la brita decido ekŝiĝi el Eŭropa Unio demisiis la ĉefministro David Cameron [kamron]; kelkajn tagojn post lia demisio enposteniĝis lia posteulo, Theresa May [teriza mej].

Cameron, kiu ĉefe pro internaj partipolitikaj kialoj promesis referendumon kaj kiu kampanjis por resti en la Unio, sentis sin venkita. Sendube mankis al li emo kaj energio por gvidi longajn kaj kompleksajn negocojn por elvringi el iamaj eŭropaj partneroj favorajn elirokondiĉojn por Britio.

Neatendite fuĝis ankaŭ la arkitektoj de la breksiĝo-kampanjo. Kredeble suk-

ceson ili ne atendis kaj, kiel jam notite (MONATO 2016/06, p. 5), planojn por post-referenduma Britio ili ne posedis. Eĉ Nigel Farage [nĝl faraĝ], estro de la Sendependiga Partio de la Unuiĝinta Reĝlando, kiu vigle kampanjis por breksiĝo, tuj anoncis sian demision kiel partiestro.

## Politika terpomo

En la vakuon paŝis sinjorino May, ekde 2010 ministro pri internaj aferoj kaj, dum la referendumo, silenta, malantaŭ-la-kulisa apoganto de la Unio. Iom post iom vaporigis aliaj kandidatoj por la posteno de partiestro kaj samtempe, ĉefministro. Tro varmis la po-

litika terpomo de breksiĝo ... sed ne por la iom glacia Theresa May, kiun kelkaj komentistoj komencis kompari kun la t.n. fera sinjorino, Margaret Thatcher, brita ĉefministrino inter 1979 kaj 1990.

La feron sentis tuj la ministro pri financaj aferoj, George Osborne [ĝorĝ ozbn], kies rigora ŝpar-politiko frapis la plej malriĉajn tavolojn de la socio (kaj kiuj sin venĝis, voĉdonante dum la referendumo kontraŭ riĉa, politika elito, kiu semis tiom da mizero kaj senespero). Emfazas May, ke ŝi volas helpi ĉiujn britojn, sed ĝis nun aŭdeblas nur promesoj, ne videblas agoj.

Ŝi insistas krome, ke breksiĝo signifas breksiĝo – ne okazos dua referendumo. Por komplezi dekstremulojn en sia

partio, kaj tiujn en la lando, kiu subtenis breksigon, ŝi indikas, ke ŝi volas fermi la landlimojn kaj rezigni pri libera movado de homoj, sed ne pri libera movado de varoj kaj servoj.

## Sendependigaj voĉoj

Dubindas, ĉu kompromiso tia akcepteblas al aliaj EU-ŝtatoj. Nepras „puni” Brition, por ke aliaj landoj, kun

signifaj sendependigaj voĉoj (ekz. Nederlando), ne estu tentataj sekvi la ekzemplon de sia breksiginta najbaro.

Ne nur negocoj kun EU streĉos la paciencon de May. Ankaŭ aliaj partoj de la apenaŭ Unuiĝinta Reĝlando, unuavice Skotlando, postulas atenton. Pli kaj pli laŭtiĝas la krioj de tiuj, kiuj deziras duan skotan sendependigan referendumon: prefere sendependeco en EU ol kvazaŭa sendependeco en Unuiĝinta Reĝlando.

En tiuj turbulaj tempoj certas malmulto. Krom tio, ke Cameron eniros la prihistoriajn librojn kiel tiu, kiu eligis Brition el EU ... kaj kiu eble frakasis la britan union per la sendependigo de Skotlando. Por eĉ ne paroli pri Norda Irlando ...

**Paul GUBBINS**  
ĉefredaktoro de MONATO



BRITIO

# LA REFERENDUMO: KIEL VOĈDONIS LA BRITAJ ESPERANTISTOJ?

MONATO invitis legantojn en la Unuiĝinta Reĝlando indiki, kiel kaj kial ili voĉdonis en la juna „breksigo”-referendumo. Naŭ el dek respondoj montras klaran preferon por resti parto de Eŭropa Unio. Jen kelkaj opinioj:

**Harry Barron:** Por. „Mi ege bedaŭras la miopan decidon de la brita publiko por ekŝigi de Eŭropa Unio. Mi voĉdonis por resti, ĉar mi kredas, ke ni estas pli fortaj en la Unio.”

**Penny Bryant:** Por. „Mi voĉdonis por resti en Eŭropo. Mi laboras en mal-sanulejo kadre de la nacia sanservo kaj do havas multajn kolegojn el aliaj landoj, kaj ni bezonas ĉiujn. Britio estas tro malgranda lando por trakti sola kun aliaj, kaj ekonomia timo pri la estonteco ne estas bona. Ni bezonas amikojn en aliaj landoj, sed ni turnis niajn dorsojn.”

**Andreo Peperdajno:** Por. „Mi donis mian voĉon kontraŭ breksigo, ĉar laŭ mi Britio devos esti parto de pli granda grupo, por ke ĝi povu protekti sin

kontraŭ la grandaj komercaj fortoj, kiuj aperis dum la lastaj 50 jaroj. Tamen mi kredas ankaŭ, ke la rezulto estas krio por helpi kontraŭ la regantaro (establo), kaj registara kaj komerca.”

**John Roberts:** Kontraŭ. „Mi voĉdonis por breksigo, unue ĉar mi volis sekurigi demokration en Britio post tiom da jarcentoj kaj ankaŭ helpi redemokratiigi EUnon. Due, kaj bedaŭrinde, mi devis finfine akcepti, ke la strukturoj kaj pensmanieroj de la EU-estraro neniam povos funkcii laŭ la ekonomiaj interesoj de la membroj de EU kaj neniam povos kreskigi la ekonomion kaj krei laboron por nunaj aŭ estontaj gejunuloj en Britio aŭ en EU.”

**Angus Wilkinson:** Por. „Mi opinias, ke tro da argumentoj koncernis nur la

ekonomion, kaj ĉu ni britoj pli riĉiĝos ekster EU. Mi voĉdonis por resti en EU, ĉar mi kredas, ke la devizo ‘amu vian proksimumon kiel vin mem’ devus esti konkrete praktikata.”

Ankaŭ el ekster Britio reagis MONATO-korespondantoj:

**Bardhyl Selimi** (Albanio): „Ĉiu popolo konas pli bone siajn aferojn, tiel ankaŭ britoj. Cetere ili certe cerbumos pri la situacio, ankaŭ Eŭropo. Eble la reguloj de EU devas pliboniĝi.”


**Roberto Pigro** (Kipro): „Britio, kien? Britio, nenien. Mi opinias, ke oni (ĉiuj) faros la plejblon por etigi kaj forgesigi la rezulton de ĉi tiu nur ‘konsulta’ referendumo. La eliro de Britio estas nura sapveziko,

simbole grava pro ĝiaj intencoj sed fakte ne simple plenumbla (kaj certe ne plenumbla ene de kelkaj monatoj). Ĝi baldaŭ krevos kaj, miaopinie, neniujn revoluciajn sekvojn havos.”

**Julius Hauser** (Slovakio): „La referendumo havis multe pli larĝan signifon. La popolo decidis ankaŭ surbaze de emocioj, kiuj resonas dum jardekoj en rilato al la brusela burokratario. Gravan rolon ludis ankaŭ sento de timo pri perdo de nacia identeco kaj suvereneco. Nun EU havas post la referendumo okazon por redefini la eŭropan projekton, kiu povus kontentigi la aspirojn de la loĝantaroj pri ekonomia, socia kaj lingva justeco.”

REDAKcie

# MALFIDINDAS PUBLIKAJ INFORMOJ



TORTUGA767

Aŭskultantoj de la malmultaj lastaj kulturaj radioprogramoj en Germanio prefere limigu sian aŭskultadon al senkulpaj muzikaj elementoj (se oni ekzemple la komponiston Richard Wagner taksas senkulpa), sed prefere ne ĉiun matenon je la sepa horo spektu la novaĵojn.

Eĉ la publikjuraj elsendostacioj, subvenciataj de impostopagantoj, plene kaj daŭre ignoras la direktivojn de MONATO pri egala, senpartia, objektiva, neŭtrala ktp. raportado.

Ili dissendas siajn proprajn preferojn, kiujn ili ja ne publike deklaras, sed kiuj ĉiutage evidentiĝas. Se iliaj mastroj volas helpi forpuŝi politikiston, partion,

opinion, projekton, ili daŭre kaj tre lerte subfosas reputaciojn.

Pri iliaj favoratoj inverse. Guto post guto traboras la ŝtonon. La frumatena cerbo estas mola kaj baldaŭ cedas. Malmultaj homoj rezistas la cerbolavadon kaj malŝaltas.

Ĉu necesas diri, ke la preferoj de tiuj programestroj estas „maldekstraj”, por almenaŭ iom indiki la pensmanieron laŭ kriterioj de la pasinta jarcento? Ili mem opinias sin „progresemaĵ”, kvazaŭ ili persone reprezentus la mondspiriton, laborante en ĝia nomo por la estonteco.

Eĉ bonvolemaj homoj (germane: *Gutmenschen*), kiuj verve apogas tujan „integradon” de ĵus alvenintaj migrantoj, devas aŭskulti radiostacie aplombajn komentariojn, ke novaj komunumoj rajtas gardi siajn iamajn morojn, sed la aŭtohtonaj prefere ne.

Legantoj de MONATO estu avertitaj kaj atentemaj antaŭ radiaj kaj televidaj programoj, almenaŭ se ili konas kaj aprezas la ĵurnalismajn principojn de sia magazino.

.....  
Franz-Georg RÖSSLER  
*Germanio*



**La Deklingva manlibro pri politiko de Stefan Maul helpas vin trovi vian vojon en la politika ĵargono.**

*Stefan Maul*

Mendu ĝin de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio, butiko@fel.esperanto.be aŭ www.retbutiko.net kontraŭ 9,50 eŭroj + afranko.

KROATIO

# PIEDPILKO POLITIKA

**D**isfalis post nur ses monatoj la koalicio inter la dekstra HDZ kaj la nova partio *Ponto*. Ĉi-lastaj, laŭ pluraj ĵurnalistoj, estas partio spronita de la katolika eklezio.

Ne ekzistas alia eblo krom novaj elektoj. La parlamento jam akceptis decidon pri memdisiĝo. Balotoj okazos komence de septembro. HDZ fine malstabiligis, kaj la prezidanto, elektita per granda plimulto de partiaj membroj antaŭ nur unu monato, devis rezigni pri sia pozicio.

Falis do la registaro, kiun prezidis nepartia ekonomiisto. Ĝi plufunkcios ĝis novaj elektoj kiel teknika registaro, kiu ne rajtas decidi pri gravaj aferoj, do ankaŭ monaj.

Dum ses monatoj la registaro kaj parlamento akceptis neniun gravan decidon, kvankam la lando dronas en problemoj, ĉefe ekonomiaj. La politika situacio ŝajnas kaosa. Neniu scias, kiel voĉdoni dum la sekva baloto, kaj ĉu tio solvos la problemon. Ĉu eblos kunmeti koalicion, kiu kunmetus registaron?

Samtempe okazas la eŭropa futbalĉampionado. En ĝi la kroata teamo montris bonajn rezultojn. En la unua fazo ĝi okupis la unuan pozicion en sia grupo. La popolo feliĉegis. Pro la futbalo ĉiuj forgesis pri politiko kaj ŝultrolevas pri la politika kaoso. Kreskegis patriotismo.

Ĝis nun kroatoj ne ludis kontraŭ najbaroj, kio pliprofundigus naciismon. Tial evoluis nur pozitiva patriotismo. Kiam kelkaj futbaladeptoj jetis torĉojn



*Pro la futbalo ĉiuj forgesis pri politiko kaj ŝultrolevas pri la politika kaoso. Kreskegis patriotismo.*

dum la matĉo inter Kroatio kaj Ĉeĥio, aliaj tre ekscitiĝis pro la nepatriotisma ago kaj ekluktis kontraŭ la iniciatintoj de la malordo.

Kiam vi legos ĉi tiun artikolon, la ĉampionado estos finita. Oni scios, kiun lokon okupas Kroatio. Sed tio esence ne gravas. Gravas, ke sportoj en difinitaj cir-

konstancoj, povas ludi pozitivan rolon. Ili kapablas kvietigi la popolon rilate politikon kaj krei favoran psikan staton dum situacio zorgiga.

**Zlatko TIŠLJAR**  
korespondanto  
de MONATO en Kroatio



ALBANIO

# MALNOVAJ ARGUMENTOJ DE NOVAJ REGISTAROJ

Protestis albanoj loĝantaj en la norda parto de Grekio pro vizito al Albanio en junio de la greka ministro pri eksteraj aferoj, Nikos Kotzias.

La albanoj, anoj de la patriotisma asocio Çamërio [ĉamerio], regiono kompakte loĝata de albanaj etnuloj, protestis, ĉar la ministro alvenis por altrudi al la loka registaro redifinon de la marlinio interlanda.

La iama registaro demokrata estis devigita akcepti la redifinon, por ke Grekio voĉdonu favore por la liberaligo de vizoj por albanoj. Tamen la konstitucia juĝejo nuligis la interkonsenton.

## Milito

Plie, ministro Kotzias repostulis konstruon de pliaj tombejoj kun la ostoj de grekaj soldatoj falintaj en la regiono dum la itala-greka milito 1940-1941. La albana registaro ne kontraŭas sed volas, ke oni konsideru soldato nur tiun, kiu posedis soldatan identigilon. Se ne, oni kiel nun daŭre reentombigus kiel grekajn soldatojn ankaŭ albanajn mortintojn, eĉ infanojn.

La asocio Çamërio, de pluraj jaroj organizita kiel politika partio parlamenteca, insistas, ke ĉamoj revenu al siaj teroj en Grekio kaj kompensigu. La afero iris jam al la homrajta kortumo en Strasburgo.



## Bienuloj

Cetere Grekio havas normalajn rilatojn kun Albanio. La greka malplimulto sude en la lando, delonge servinta kiel terkulturistoj kaj taglaboristoj ĉe albanaj bienuloj, ekde 1991 akiris la rajton posedi teron samkiel ĉiuj aliaj albanoj.

En Grekio jam de 25 jaroj laboras kelkcent miloj da albanaj ekonomiaj

rifuĝintoj. Grekio okupas la duan lokon inter investintoj en Albanio kaj ambaŭ landoj kunmembras en Nord-Atlantika Traktato-Organizaĵo (NATO).

**Bardhyl SELIMI**  
korespondanto  
de MONATO en Albanio



GERMANIO

# DE PRINCOJ AL PACO



*Palatinato restas nun serena angulo apud la franca landlimo.*

La suda distrikto de la germana federacia lando Rejnlando-Palatinato festas en 2016 propran kaj apartan institucion. Antaŭ 200 jaroj fondiĝis distrikta parlamento de Palatinato (germane: *Bezirkstag Pfalz*) kadre de la tiam novaj landlimoj de la reĝolando Bavario.

Tiun fondon antaŭiris pli ol sepjarcenta komuna historio de Bavario kaj Palatinato kun komuna gloro, sed pli ofte kun detruaj kvereloj kaj iliaj teruraj rezultoj. Ekzemple la protestanta palatinato Frederiko la 5a oponis al la habsburga imperiestro kaj volis fariĝi reĝo en Prago/Bohemio.

## Elekta princo

Tiu ekpaŝo, dum nur unu vintro rekte en la 30jaran milton meze en Eŭropo, al li perdis ĉion. La katolika bava-

ra parenco venkis lin kaj ricevis iliajn rajtojn kaj honorojn de elekta princo (germane: *Kurfürst*) por elekti imperiestrojn de la Sankta Roma Imperio de la Germana Nacio.

Poste Napoleono renversis la ĝistiaman ŝtatan ordon en Eŭropo, kiun la Viena Kongreso ĉirkaŭ 1815 denove devis restarigi. Post komplikaj traktadoj okazis nova kunfandiĝo de la du malsamaj regionoj sub la regado de la sama reganta familio Wittelsbach.

Palatinato, sen geografiaj kontaktoj kun la aŭtenta Bavario, fariĝis ĝia „rejna distrikto”. Por iom kompensi la potencon de la munkenaj oficialuloj trans Rejno, oni permesis regionan parlamenton en Palatinato en 1816.

## Politikaj ŝanĝoj

Jen la kialo por festi la institucion, kiu ne perdiĝis malgraŭ la diversaj po-

litikaj ŝanĝiĝoj dum 200 jaroj. Ĝi ja ankoraŭ nuntempe iel ekzistas.

La distrikta parlamento subtenas plurajn kulturajn, sociajn kaj instruajn instituciojn. Tien kaj en siajn plej gravajn urbojn Speyer, Kaiserslautern, Pirmasens, Frankenthal kaj Neustadt/Weinstrasse ĝi invitas por festi la eventon, ofte per la dirajo Bavario kaj Palatinato – sub Dia gardado (germane: *Bayern und Pfalz – Gott erhalt's*).

La francoj, malgraŭ daŭraj provoj alproprigi Palatinaton, ne kapablis enlandigi ĝin. La bavaroj ekde 1946 tie ne plu ludas rolon. Memorojn pri la kruela pasinteco kun la francoj kaj bavaroj superondas dum la festojaro kompatemaj, aŭ prefere, gajaj vualoj de eterna interkompreniĝo.

**Franz-Georg RÖSSLER**  
korespondanto  
de MONATO en Germanio





La stacidoma tegmento same imponas de sube kiel de supre.

AŬSTRIO

# ŜTALA TEGMENTO POR FERA VOJO

La tegmento de la nova viena ĉefstacidomo, konstruita el 14 romboj, imponas. Ĝi konsistas el 7000 tunoj da ŝtalo: por la 312 metrojn alta pariza Ejfela Turo, finkonstruita en 1889, oni bezonis nur iom pli (7300 tunojn). La stacidoma

areo estas 31 000 m<sup>2</sup>, la longeco 200 m, la larĝeco 120 m.

Uzante la stacidomon, la pasaĝeroj profitas. Oni ne plu devas alveturi la iaman Sudan Stacidomon, iri centon da metroj kaj atendi en la apuda Orienta Stacidomo. Nun oni povas komforte ŝanĝi trajnojn ĉe la sama kajo aŭ povas

eĉ simple traveturi la stacidomon post mallonga halto.

De la nova stacidomo oni veturas rekte al multaj urboj en Aŭstrio kaj en eksterlando: Zuriko, Munkeno, Frankfurt, Prago, Budapeŝto, Zagrebo, Venecio, Varsovio, Beogrado, Romo, Berlino, Bukareŝto kaj aliaj.





La stacidoma tegmento, longa 200 m kaj larĝa 120 m, kun areo de 31 000 m<sup>2</sup>.

## Pintaj horoj

La stacidomon uzas ĉiutage 145 000 pasaĝeroj. Dum la pintaj trafik-horoj en ĉiu minuto alvenas aŭ forveturas unu trajno. Ĉiutage uzas la stacidomon entute 1100 trajnoj.

La stacidomo kostis unu miliardon da eŭroj, precize la sumon, kiun oni kalkulis laŭ la ofertoj. Tio rimarkindas, ĉar dum la konstrutempo – de 2011 ĝis 2015 – unu granda konstrufirmao fariĝis ne plu solventa.

Ankaŭ la dutraka fervojlinio de la ĉefstacidomo rekte al la flughaveno estas parte nova. Por ĝi oni devis, super la centra rangostacio, konstrui 200 metrojn longan ponton, por kiu oni bezonis 2300 tunojn da ŝtalo.

**Walter kaj Renate KLAG**  
korespondantoj  
de MONATO en Aŭstrio



*Christian [kristjan] Kern, la ĝenerala direktoro de la Aŭstra Federacia Fervojo dum la malfermo de la stacidomo. Ekde majo 2016 li estas la ĉefministro (Bundekanzler) kaj ĉefo de la aŭstra socialdemokratia partio.*



*La malnova sabloŝtona Markusleono kun flugiloj (skulptita en 1873) memorigas pri la iama suda stacidomo kaj la fervoja ligo inter Vieno kaj Venecio.*

JAPANIO

# KVIN JAROJN POST FUKUŜIMO

**I**i-jare en aprilo pasis 30 jaroj post la nuklea akcidento en Ĉernobilo en Ukrainio. Ankoraŭ ne estas forigita la damaĝita reaktoro.

Ankaŭ ĉi-jare en marto pasis kvin jaroj post la katastrofo en la atomcentralo en Fukuŝimo, Japanio. Ĉi tie oni ankoraŭ ne komencis finforigi la reaktorojn. Ankoraŭ loĝas ĉirkaŭ 100 000 homoj kiel rifuĝintoj ekster sia hejmloko.

Ĉiutage pli-malpli 7000 homoj laboras en la centralo n-ro 1 de la Tokia Elektro-Pova Kompanio (TEPKO) por prepari la malmuntadon de la damaĝitaj reaktoroj. La registaro kaj TEPKO opinias, ke oni bezonos ĉirkaŭ 40 jarojn, sed multaj fakuloj tion taksas tro optimisma.

## Fandiĝintaj brulaĵoj

Oni tute ne komprenas la staton de la laŭdire 600 tunoj da fandiĝintaj brulaĵoj en la tri frakasitaj reaktorkernoj. Por esplori la internon de la reaktoroj TEPKO ekspluatis robotojn kaj sendis ilin internen, sed ili paneis pro la tre forta radioaktiveco.

TEPKO planas elpreni la fandiĝintajn brulaĵojn el la reaktorkernoj, sed tiu, kiu respondecas pri la realigo de la plano, agnoskis, ke la kompanio ne posedas la koncernan teknologion. Kelkaj nun opinias, ke oni baldaŭ forjetos la planon kaj konstruos

ŝtonĉerkon ĉirkaŭ la reaktoroj kiel en Ĉernobilo.

Nuna urĝa tasko estas haltigi la elfluon de radioaktive poluita akvo el la frakasitaj reaktoroj en la maron. Ĉiutage 400 tunoj da subtera akvo el la montara regiono enfluas en la detruitajn reaktoro-domojn kaj miksiĝas kun la poluita akvo, kiu malvarmigis la reaktoro-kernojn.

## Ŝtalaj akvujoj

Tial TEPKO ĉerpadas akvon kaj konservas ĝin en grandaj ŝtalaj akvujoj konstruitaj ĉe la tereno. La nombro de tiuj akvujoj atingis pli ol 1100. Kiel pli radikala rimedo TEPKO nun konstruas subteran glaciigitan muron, 30 metrojn profundan kaj 1,5 kilometrojn longan ĉirkaŭ la kvar reaktoro-domoj.

Oni enŝovis 1500 tubojn en la teron kaj plenigas ilin per likva kemiaĵo je minus 30°, por ke la frostigita subtera muro bloku la enfluon de subtera akvo. Ĉi tiu teknologio, kiun oni antaŭe uzis por konstrui metroo-tunelojn, ne estas tiel grandskale provita.

Preskaŭ finiĝis la purigado, aŭ pli precize la forigo kaj la translokado de radioaktive poluita surfaca tero de kampoj, ĝardenoj kaj hejmoj. Pli ol 10 milionoj da grandaj sakoj da kolektita tero kaj rubaĵo estas stakigitaj en miloj da portempaj lokoj en Fukuŝimo kaj najbaraj gubernioj. Oni ne, eventuale neniam, povos trovi finajn stakigejojn, ĉar neniu municipo akceptis tiajn deponejojn.



## Granda tertremo

Evidentiĝas, ke la nuklean akcidenton de Fukuŝimo kaŭzis homa neglekto. Tuj post la akcidento la direktoraro de TEPKO insistis, ke ĝi ne povis antaŭvidi atakon de cunamo 15,5 metrojn alta. Sed jam en 2002 registara instanco, Promocia Centro de Tertrema Studado, prognozis, ke en la marfundo proksime de nord-orienta Japanio okazos granda tertremo je magnitudo 8 ene de 30 jaroj je probableco de 20%.

Surbaze de tiu prognozo stabanoj de TEPKO kalkulis kaj raportis en 2008, ke cunamo 15,7 metrojn alta povos ataki la fukuŝiman centralon kaj ke necesos kontraŭrimedoj. Sed la admi-



nistrantaro preferis damaĝi elspezojn ol konstrui digojn kontraŭ cunamoj.

Tial en 2012 rifuĝintoj kaj familioj de mortintoj postulis, ke la prokurora oficejo akuzu la tri eksajn respondecajn direktorojn de TEPCO pro mortigo kaj vundado kaj pro profesia neglekto. La ŝtata prokuroro decidis ne publike ilin akuzi.

### Komisionaj reguloj

Tamen komisiono pri prokuro-raj procesoj, kies membroj konsistas el elektitaj civitanoj, rezoluciis, ke la prokuroro ilin tamen akuzu. Denove la prokuroro ne akuzis, kaj la komisiono dufoje rezoluciis, postulante akuzon. Laŭ la komisionaj reguloj nun

komenciĝis proceso, en kiu la prokuroron anstataŭas advokatoj kortume nomumitaj.

Kompenso-cele plendis antaŭ la civila kortumo kontraŭ TEPCO ankaŭ pli ol 12 500 rifuĝintoj kaj viktimoj. Rimarkinde estas, ke en Usono ĉirkaŭ 400 eks-marsoldatoj ekprocesis kontraŭ TEPCO por kompenso pro tio, ke ili estis elmetataj al radioaktiva substanco ellasita el Fukuŝimo.

Tiam usonaj militŝipoj helpis viktimojn de la cunamo proksime al la marbordo. Laŭdire kelkaj maristoj mortis kaj multaj suferas pro malsanoj rilataj al la radiado. La usona ministrejo pri defendo neis la rilaton inter la malsanoj kaj la radiado.

### Paneinta centralo

Ĝis nun la registaro kaj TEPCO kalkulas la koston de la malmuntado de la paneinta centralo: pro kompenso de damaĝoj, ekvivalenton de 22,2 miliardoj da eŭroj; pro purigo kaj portempa stakigo, 31,5 miliardojn; kaj pro malmuntado kaj kontraŭrimedoj kontraŭ poluita akvo, 17 miliardojn.

Neniu scias, kiom la sumoj pligrandiĝos. Ĉiaokaze la koston pagos la japana popolo. Dume la registaro daŭre insistas, ke nuklea energio estas malpli multekosta ol aliaj energifontoj.

.....  
**ISIKAWA Takasi**  
 korespondanto  
 de MONATO en Japanio



TERTREMOJ

# KIAM MANKAS AKVO, ELEKTRO KAJ MANĜAĴOJ



En aprilo tertremo kun magnitudo 6,5 frapis la japanan gubernion Kumamoto, aparte la urbeton Maŝiki kaj la urbon Kumamoto.

Kiam okazis la tertremo, mi skajpis en mia ĉambro en Kumamoto. Saltante kaj flugante falis multaj aĵoj, inkluzive de pezaj statuetoj el la hejma altaro. Elŝrankiĝis glasoj kaj rompiĝis tasoj. La ŝrankoj mem ne falis, do mi ne vundiĝis, tamen frapis min kelkaj libroj. Mia apartamentaro estas iom ŝirmita kontraŭ tertremoj, tamen ĝi freneze ŝanceliĝis.

La sekvan tagon la urbo permesis, ke ni enrubujigu rompitaĵajn kaj difektitajn posedaĵojn. Mia komputila printilo ne plu funkciis kaj mi ĝin forĵetis, kune kun rompitaĵaj glasoj, tasoj kaj bovloj.

Mi ordigis kaj purigis la ĉambrojn kaj poste iris al superbazaro por aĉeti manĝaĵojn, sed ĝi estis fermita. Nur t.n. oportuna vendejo funkciis, sed en ĝi restis nenio krom libroj kaj kosmetikaĵoj.

Tamen du tagojn poste la urbon skuis alia, eĉ pli forta, tertremo, kun magnitudo 7,3. Laŭdire neniam en nia historio tiel fortegaj tertremoj okazis sinsekve en la sama loko. En mia ĉambro la supra parto de la komodo falis. Post la unua tertremo mi metis multajn librojn tavolo sur la plankon, sed pro la dua tertremo ĉiuj libroj saltis kaj ĉien disĵetiĝis. Libroŝranko apud mia lito falis sur ilin, do mi tute ne povis ĝin uzi.

JUNG JINGHO



HANOJIMAS

La pordo de la fridujo spontane malfermiĝis kaj el ĝi manĝaĵoj elfalis. En alia ĉambro, kvankam la budha altaro nur iomete difektiĝis, ĉiuj budhaj statuetoj flugis en ĉiuj direktoj. Denove mi perdis tasojn, telerojn, bovlojn kaj multekostajn ceramikaĵojn.

Dum kelkaj tagoj ne haveblis akvo. Mi feliĉe uzas propangason, do mi povis kuiri, sed en iuj lokoj ankoraŭ disponeblas nek gaso, nek elektro. Falintaj muroj blokis vojojn kaj estis malfacile viziti vendejojn. Ankaŭ la polico ne povis facile helpi viktimojn de la tertremoj.

Ne funkciis aŭtoŝoseoj, fermita estis la flughaveno, kaj rapidtrajno elreliĝis. Vidindaĵo, la kastelo Kumamoto, estas

detruita, kaj necesos multe da mono por ĝin rekonstrui. Ĉe alia turisma loko, la ĝardeno Suizenĵi, konata pro bela lageto kun pura akvo, malaperis la akvo kaj mortis la tieaj karpoj.

Nun ĉe mi finfine ekfunkciis la akvo. Mi povas lavi manĝilaron kaj min bani. Sed post la katastrofo dum kelkaj tagoj mi ne povis uzi la necesejon. Post la unua tertremo amiko sendis al mi boteblojn da akvo kaj tio multe helpis.

Poste li sendis aliajn aĵojn: plastajn kulerojn, jam pretajn manĝaĵojn, malsekan tualetpaperon por purigi la korpon, ktp. Aliajn amikojn, inkluzive esperantistojn, kiuj sendis ekzemple vestaĵojn, mi ne povas sufiĉe danki.

Ankoraŭ daŭras la tertremoj. Ĝis la fino de aprilo estis registritaj mil tremoj. Ni ne scias, kiam ili ĉesos. Intertempe ni volas, ke la registaro haltigu la atomenergian centralon en la najbara gubernio Kagoŝima.

Multaj perdis sian domon. Turismo estas minacata pro la tertremoj. Tiuj, kiuj volas helpi la rekonstruadon de Kumamoto, trovos en Interreto, kiel sendi mondonacojn.

**HARADA Tukurū**  
korespondanto  
de MONATO en Japanio



IRLANDO

# MALSEKRETA SEKRETO

**C**iu jare miloj da virinoj kaŝe veturas de Irlando al Britio. Kelkaj mensogas, dirante, ke ili vojaĝas por butikumi; aliaj, ke ili simple ekskursas, ne dirante, kien. Ili revenas, tamen, kun sekreto. Sekreto, cetere, kiun ĉiuj scias. Temas pri abortigo – la problemo, pri kiu la ŝtato volas, ke ĝi ne ekzistu.

Multaj homoj kredas Irlandon katolika. Ĝis la 1990aj jaroj ĝi ja estis. Preĝejoj estis plenaj, eksedziĝo malpermesita, kaj eĉ informoj pri abortigo cenzuritaj. Sed Irlando multe ŝanĝiĝis.

## Seks-skandaloj

Malplenas preĝejoj, parte pro tio, ke multaj homoj ne plu fidis la eklezion pro seks-skandaloj kaj mistraktado de infanoj. Permesitaj estas nun eksedziĝo, samseksemo kaj kontraŭkoncipiĝo. Pasintjare granda plimulto de la popolo voĉdonis por permesi al samseksemuloj edziĝon kun la samaj rajtoj kiel malsamseksemuloj.

Nun oni atentis abortigon. De longe regas neoficiala interkonsento prisilenti la aferon. En 1983 oni aldonis al la konstitucio la 8an amendon, kiu donis la saman vivo-rajton al „nenaskita infano” kiel al patrinigonto.

Ĝis 1992 oni ne rajtis ricevi informojn pri abortigo aŭ vojaĝi eksterlanden por ricevi abortigon. Nur voĉdono kaj konstitucia amendo donis ĉi tiun rajton. Nur en 2013 oni permesis abortigon, se la vivo de la patrino estas endanĝerigita.



EVAN MELLAUGH

## Malliberejo

Eĉ se virino estas seksperfortita, aŭ la fetoto ne vivo-kapabla ekster ŝia korpo, oni ne rajtas peti abortigon. La puno por abortigo: 14 jaroj en malliberejo (antaŭ 2013 dumviva enkarcerigo).

Do ĉiujare miloj da irlandaninoj flugas al Britio (sed ne al Norda Irlando, ĉar ankaŭ tie abortigo estas malpermesita). Neniu scias, kiom da virinoj tien vojaĝas (evidente ne ekzistas listo pri neleĝaj aferoj), sed certe almenaŭ kelkaj miloj. Kiam ili revenas al Irlando, ili ricevas nek helpon, nek subtenon, ĉu spiritan, ĉu fizikan.

Ili ofte hontas rakonti al amikoj aŭ familianoj pri tio, kion ili faris, kaj do ili suferas solaj. Sed ekzistas ankaŭ problemo por virinoj, kiuj malhavas monon por veturi. Kaj nun oni timas, ke la vojaĝo fariĝos por ĉiuj pli malfacila, se Britio ja eliros el EU kaj limigos la eniradon de eksterlandanoj.

## Bebomortigistoj

La sintenon de Irlando kritikis kaj Unuiĝintaj Nacioj, kaj la Eŭropa Kor-

tumo pri Homaj Rajtoj. Ili volas, ke la ŝtato ŝanĝu sian leĝon. Sed politikistoj ne volas pridiskuti abortigon. Ili timas, ke la afero estas tro tikla, tro koleriga, kaj ili ne volas esti nomataj „bebomortigistoj”.

Ili opinias, aŭ ke ne ekzistas problemo aŭ ke, se abortigon ili permesus, tio „malfermus la kluzojn” kaj estigus „abortigon laŭ postulo”. Ŝajnas, ke oni ne povas trankvile pridiskuti la problemon sen akraj disputoj. Pli facilas forsendi la problemon al Britio.

Sed la virinoj ne restos silentaj. Ili parolas pli kaj pli pri siaj abortigoj. Multaj ne plu hontas, argumentante, ke oni malkaŝe pridiskutu la problemon. Ili ne plu volas, ke la ŝtato, aŭ la eklezio, decidu, kaj ili postulas la rajton mem elekti pri sia sorto. Tamen ĝis estos ŝanĝita la leĝaro, miloj da irlandaninoj daŭre flugas al Britio.

**Robert NIELSEN**  
korespondanto  
de MONATO  
en la Irlanda Respubliko



KUBO

# MIRINDA NOVAĴO



JUAN CARLOS MONTERO MEDINA

*La ceremonio por honori Havanon okazis sur la esplanado de la Fortreso de San Salvador de la Punta – unu el la mirindaĵoj en tiu ĉi nun mirinda urbo.*

**K**vazaŭ bunta ĉielarko super la kuba ĉefurbo Havano pendis la novaĵo, ke ĝi estas elektita unu el sep tiel nomataj mirindaj urboj de la mondo.

La oficiala ceremonio en Havano okazis en junio 2016, kiam reprezen-

tantoj de la svisa fondaĵo *New7Wonders* (N7W), kiu aranĝis tutmondan voĉdonadon por trovi sep novajn mirindaĵojn, transdonis atestilon.

Aliaj urboj tiel elektitaj estas Bejruto, Daŭho, Durbano, Kuala-Lumpuro, Lapaco kaj Vigan. Jen la tria fojo, ke N7W okazigis tian elektadon. Koin-

cide, la ceremonio ankaŭ heroldis la 500an datrevenon de la fondo de Havano, kiu okazos en 2019.

.....  
**Juan Carlos MONTERO MEDINA/pg**

korespondanto  
de MONATO en Kubo

SLOVAKIO

# KURAĜA VERKISTO



La tombo de Vajanský en Martin.



La flanko de la tombo de Vajanský portas lian konatan ideon: „Sen ofero la nacio ne povas ekleviĝi.”

**A**ntaŭ 100 jaroj, la 17an de aŭgusto 1916, mortis Svetozár Hurban Vajanský, unu el la plej renomaj figuroj de la slovakia realismo.

Dum kelkaj jardekoj Vajanský okupis gvidan pozicion en la slovakia nacia kulturo kiel poeto, verkisto, publicisto kaj redaktoro de *La nacia gazeto* (*Národné noviny*) kaj la revuo *Slovakaj rigardoj* (*Slovenské pohľady*), en kiuj li glosis la politikan kaj kulturalan vivon en Slovakio.

Laŭ iuj li estis rimarkinda verkisto de la slovakia realismo de eŭropa for-

mato; laŭ aliaj li nur preparis la vojon al modernaj slovakaj prozo kaj kritikistoj. Kie kuŝas la vero?

## Advokata praktikanto

Vajanský naskiĝis la 16an de januaro 1847 en la slovakia vilaĝeto Hlboké. Li studis juron en Bratislavo kaj en Budapeŝto. Li komencis labori kiel advokata praktikanto kaj pli poste kiel profesoro en Bulgario kaj Rusio. Pro sia ĵurnalista agado li estis plurfoje police persekutata. Li mortis en la aĝo de 69 jaroj kaj estas entombigita kun sia edzino en la urbo Martin.

Per sia unua poemaro *Tatroj kaj maro* li elvokis favoran eĥon ĉe la legantoj per nova rigardo al la realeco. Li altiris atenton al aktualaj demandoj kaj montris la belon de la slovakia lingvo kaj ĝian kapablon arte esprimi eĉ la plej komplikajn temojn de la epoko.

Sed la arta talento de Vajanský realiĝis precipe en prozo. En la kolekto de prozaĵoj *Bildoj el la popolo* dominas ankoraŭ la vilaĝa homo, sed en sia sekva kreado li prenis siajn temojn el la vivo de la intelektularo kaj de pli alta socio.

## Klera legantaro

Li kalkulis je klera legantaro kaj al ĝi li direktis siajn multajn novelojn (i.a. *Lilio*, *Postsomero*, *Flugantaj ombroj*) kaj romanojn (*Seka branĉo*, *Radikoj kaj markotoj*, *Floroj en dezerto* kaj aliaj). Siajn observojn el siaj vojaĝoj en slavaj landoj li eluzis en siaj vojaĝpriskriboj *Dubrovnik-Cetinje*.

Post lia morto aperis en du volumoj elekto el liaj literaturaj kritikaj artikoloj (*Ĉapitroj el la slovakia literaturo* (1956) kaj *Ĉapitroj el la monda literaturo* (1957)), kie li montriĝis eminenta kritikisto de originala literatura kreado kaj tre bona konanto de monda literaturo.

## Honora loko

Vajanský havas honoran lokon en la historio de la slovakia literaturo. En noveloj kaj romanoj li donis al la slovakoj veran bildon de la vivo kaj de la homo, kompareblan kun aliaj verkoj de la eŭropa literaturo.

La literaturan kaj vivan agadojn de Vajanský rememorigas en Slovakio monumentoj, stratnomoj kaj publikaĵoj. Ankaŭ akvofalo en la montaro Altaj Tatroj portas la nomon *Vajanského vodoпад* (Akvofalo de Vajanský).

**Julius HAUSER**

korespondanto  
de MONATO en Slovakio





# STRIGO-KAFEJO



Tiu ĉi bela strigo estas nur unu el la 32 ĉe la tokia „strigo-kafejo”.

**E**n Japanio multiĝas kafejoj, kie katamantoj povas karesi katojn. Sed ĉar la nombro de kato-kafejoj atingis ĉirkaŭ 350 en la nuna jaro, ili ne tiom eksterordinaras. Do altiras la atenton de la publiko „strigo-kafejoj”.

Strigojn oni rigardas kiel speciale amindajn birdojn. Ĉar iliaj vizaĝoj estas plataj, kun antaŭendirektataj okuloj, samkiel tiuj de homoj, kaj ĉar ili rekte sidas, oni facile personigas ilin. Fojfoje ili estis rigardataj kiel saĝuloj – filozofoj aŭ ninĵaĵoj en arbaroj.

## Feliĉo kaj bonŝanco

Eĉ grandaj strigoj senbrue alflugas por kapti predon. En la japana lingvo strigo estas *fukuro*, kaj „fuku” havas saman prononcon kiel feliĉo aŭ bonŝanco. Antaŭe, tamen, en Ĉinio kaj Japanio oni diris, ke strigo manĝas sian patrinojn, kaj do oni taksis malbenitaj iliajn kriojn.

Hodiaŭ preskaŭ neblas vidi strigojn en urbaj regionoj. Tamen lastatempe populariĝis la birdo pro la libroj pri Harry Potter: la juna magiisto Harry uzis neĝo-strigon por porti mesaĝojn.

Antaŭ kelkaj jaroj en Japanio ekestis do „strigo-kafejoj”. Nun troviĝas ĉirkaŭ ok en Tokio kaj Osaka. Unu el ili estas la tiel nomata hejmo de strigoj en Sugamo en la centro de Tokio.

## Koturnoj kaj kokidoj

Ĉi tie troveblas 32 strigoj de 26 specioj, ĉefe importitaj el eksterlando. Plejparte ili sidas sur stangoj en granda vitra ĉambro en la kafejo. Ili varias de ekzempleroj de grandeco de 50 cm kaj de pezo de 3 kg ĝis strigo tiel malgranda kiel pasero. Verŝajne plej ŝatataj estas uralaj strigoj, kun grandaj nigraj okuloj, tur-strigoj ŝajne maskitaj, kaj neĝo-strigoj. Oni nutras ilin per viando de koturnoj kaj kokidoj.



ISIKAWA TAKASI

Kafejo-gasto karesas neĝo-strigon. Strigo tia fariĝis populara pro la romanoj pri Harry Potter.

Gastoj ĝuas kafon kaj strigforman kukon ĉe tabloj ĉirkaŭ la vitra ĉambro, kie ili povas observi la strigojn. Poste ili laŭvice eniras en la ĉambrojn kaj tuŝas kaj fotas strigojn.

Estas tute laŭleĝe tenadi kaj eksponadi strigojn tiamaniere en Japanio. En aliaj landoj, precipe en Eŭropo kaj Usono, tio povas esti kontraŭleĝa. Eĉ se ne, oni provokas kritikojn de besto-protektemoj.

**ISIKAWA Takasi**  
korespondanto  
de MONATO en Japanio



Eĉ la kukoj en la strigo-kafejo kontribuas al la tiea etoso.

# VOJO TRA ARBOPINTOJ



La alte konstruita vojo unikas ne nur en la baltaj landoj, sed ankaŭ en orienta Eŭropo.

**A** pud la orient-litova urbo Anykščiai, konata pro pitoreskaj naturbelajoj, en 2015 oni malfermis alte konstruitan lignan vojon. Ĝi pasas tra arbopintoj kaj unikas ne nur en la baltaj landoj, sed ankaŭ en orienta Eŭropo.

La vojolongas 300 m. Ĝi komenciĝas ĉe la ŝtonego Puntukas, kiu situas je 6 km sude de la urbo Anykščiai. La ŝtonego estas konsiderata kiel unu el la plej grandaj en Litovio. En la jaro 2000 ĝi estis nomita natura, mitologia kaj historia monumento. Sur la ŝtonego estas elĉizitaj bareliefoj de la litovaj aviadistoj Steponas Darius kaj Stasys Girėnas, kiuj

en 1933 per aviadilo *Lituanica* provis transflugi Atlantikon. Tamen ilia aviadilo rompiĝis sur la teritorio de la nuna Pollando. Puntukas estas memorloko pri ilia flugo. Ĝi estis inaŭgurita en 1943 okaze de la 10a datreveno.

Ekde la monteto de Puntukas la vojo kurbigaĝas ĉe arbopintoj. Fine de ĝi staras 35 m alta observoturo, kiun



LAST

La unika vojo komenciĝas ĉe la ŝtonego Puntukas.



LAST

Promenado laŭ la vojo.



LAST

Vizitantoj povas admiri belegajn pejzaĝojn.


oni supreniras per ŝtupetoj. De la turo malfermiĝas pitoreska vidaĵo al la arbareto de Anykščiai kaj la rivero Ŝventoji. Super la horizonto ankaŭ klare videblas la plej altaj turoj en Litovio, tiuj de la preĝejo de Sankta Mateo. La observoturon ornamas naciaj motivoj. Por handicapuloj kaj maljunuloj estas speciala lifto al la observoturo. Sur standoj turistoj povas trovi informojn pri la lokaj flaŭro kaj faŭno. En la informcentro ĉe la vojo estas ekspozicio, kiu sciigas pri la kreskaĵoj kaj bestoj de la loka arbareto. Ĝian belecon prikantis ne nur unu litova aŭtoro.

La unika vojo etendiĝas sur preskaŭ unuhektara areo. Por realigi la projekton oni uzis 395 tunojn da metalo kaj 1500 m<sup>3</sup> da betono. La promenado laŭ la vojo, gvidanta tra la arbopintoj, estas senpaga, se la vizitantoj ne deziras ĉiĉeronadon.

LAST



# DISIGAS FRANCIAN REVIZIITA ORTOGRAFIO



Ĉe la horizonto, ekde la venonta septembro, estas en Francio diskutiga novigo rilate al cepo kaj cepsupo. Temas ne pri la enkonduko de nova, genetike modifita, speco de cepo (cetere tiu ĉi estas la lingva rubriko). Tiam simple ekvalidos ortografia reformo, kiu interalie influos la skribmanieron de la vorto *oignon* (kiu, en Parizo kaj en la cetera Francio, indikas ĝuste la cepon).

### Stoika rezistado

Tiu „i”, en la dua loko, delonge silenta en la elparolo de la francoj, estas fakte ankaŭ skribe malaperonta. Post la somero de 2016, tiu vokalo do tute emeritiĝos, post longa agado, diskreta ĉeestado kaj stoika rezistado, kiuj ta-

men kostis altvalorajn notojn al ne multaj francaj civitanoj kaj tutmondaj gelernantoj de la franca lingvo.

### Politika demando

La novaĵo, kvankam venanta el lando, kiu pro daŭraj terorismaj minacoj

kaj aliaj notindaj kaŭzoj nuntempe alfrontas ege pli gravajn problemojn ol ĉi tiun pri la ĝusta skribmaniero de iuj vortoj, tamen provokis grandan diskuton en la tuta lando, kie ĝi fariĝis politika demando. Cetere ne ĉiutage okazas tiaj reformoj en eŭropaj lingvoj, tradicie

konserve maj kaj fieraj pri la etimologio (ĉi-okaze plejparte latina) de siaj vortoj. La disputo komenciĝis en la pasinta februaro: tiam la loka ministrejo pri edukado sciigis, ke, 26 jarojn post ĝia formala aprobo (ja falinta en la vakuon), la lernejoj manlibroj ekde la venonta studojaro devos finfine adopti la reviziitan ortografion de la franca lingvo.

## Oficiala deponprenanto

Ĉi-lastaj, laŭ indikoj (kiuj datiĝas de decembro 1990) de la tiam ĉefministro Michel Rocard, estis akceptita ankaŭ de la ne tre ridema *Académie française*. Temas pri institucio, kiu, ekde la epoko de kardinalo Armand-Jean du Plessis Richelieu, estas oficiala kaj severa deponprenanto de ajna rajto pri tio, kio povas esti difinita, kun la necesaj ŝanĝoj, kvazaŭ la „Fundamento” de la franca idiomo.

## Alarm-titoloj

Praktike, spite al iuj ĵurnalaj alarmtitoloj, temas ne pri vera revolucio, sed pri ieaj-tieaj simpligoj, kiuj koncernas la skribadon de 2400 vortoj: kio tamen ne malmultas. La celo? Sekvi tion, kio estas la natura evoluo de la parolata lingvo. Krom la vorto por „cepo”, modifoj venas ankaŭ por *nénuphar*, „nimfeo”: tiuj skribantaj la vorton jam nun uzu „f” anstataŭ „ph”, se ili ne volas riski ricevi de siaj instruistoj (metaforan) vergofrapon.

## Konfuziteco

Adiaŭon ankaŭ al la cirkumfleksa akcento sur la vokaloj „i” kaj „u”, krom en la okazoj, kiam ĝia ĉeesto necesas por distingi samprononcajn vortojn. Ekzemple tiu ĉi tradicia franca akcento travivos ĉe la participo de la verbo „devi” (*dû*), samkiel en la adjektivo *mûr* („matura”), tiel ke ne estiĝu nedezirata konfuzo kun la substantivo *mur*, „muro”).



En la 5a de februaro intervenis tiurilate ankaŭ eminentulo, nome Jean d'Ormesson, kiu parolis pri riskoj pri la franca identeco kaj, iom demagogie, aldonis: „Mi rifuzas paroli pri cirkumflekso, dum estas homoj, kiuj memmortigas”.

## Latindevenaj prefiksoj

Danksalutas la streketoj mem, ĝis tiam uzataj en kunmetitaj vortoj, kiuj enhavis latindevenajn prefiksojn, kiel *contre*, *entre* kaj *extra*. Oni fine simpligas kelke da akord-reguloj rilate al kunmetitaj vortoj, dum oficiale eniras la francajn vortarojn iuj neologismoj (kvankam ne tiom novaj: ili estis unuafoje registritaj antaŭ 26 jaroj: sed pli bone malfrue ol neniam, ĉu ne vere?).

## Demagogia eminentulo

En la lastaj jaroj la nova ortografio estis plurfoje rekomendita, sed neniam necesigita. Tial ĝi estis fakte nek utiligita nek disvastigita, kio verŝajne provokis tra iuj uloj la nunajn surprizon kaj konsterton. Dekstrula sindikato lanĉis peticion kontraŭ ĉi tiun, laŭdire, „reformon fian”. Eĉ membroj de la menciita *Académie* estas laŭdire sur la pado de militiro. En la 5a de februaro intervenis tiurilate ankaŭ eminentulo, nome Jean d'Ormesson, kiu parolis pri riskoj pri la franca identeco kaj, iom demagogie, aldonis: „Mi rifuzas paroli pri cirkumflekso, dum estas homoj, kiuj memmortigas”.

## Tvitera kampanjo

Oni lanĉis ankaŭ, en Tvitero (Tvitujo), „pepaĵan” kampanjon kontraŭ la reformo (*#jesuiscirconflexe*, „mi estas cirkumflekso”, ironie simiante la faman kontraŭterorisman sloganon *#jesuis-charlie*), kaj oni kolektas subskribojn por peti la demision de la ministrino Belkacem. Tiun lastan certe defendas tamen la plimulto de la junuloj: ja avertis la fakuloj, ke la misfamaj diktaĵoj, vera koŝmaro de tutlandaj lernejoj, estos nun tre pli simplaj, tiel ke malaltaj notoj estigos – espereble – malnovan memoron. Se vi parolas la francan kaj deziras taksi vian lertecon rilate al la nova ortografio, nepre vizitu la retejon de la gazeto *Le Figaro* (<http://www.lefigaro.fr/actualite-france/2016/02/04/01016-20160204ARTFIG00135-testez-vos-connaissances-sur-la-nouvelle-orthographe.php>).

**Roberto Pigro**  
redaktoro  
de la rubriko „Lingvo”



# „ELVOLVIS“ PAPIRUS-RULOJN TEAMO DE FAKULOJ

En vilao apud Napolo oni trovis depost la jaro 1750 plurajn centojn da papirusaj ruloj cindrigitaj. La domo, situanta en Herkulano kaj jam parte detruita en 62 p.K. pro antaŭa tertremo, estis tute surkovrita – de dika tavolo el fango, ŝlimo kaj lafo – 17 jarojn pli malfrue. Kiel konate kaj detale priskribite de gravaj latinaj aŭtoroj (precipe Plinio la Juna, kies onklo Plinio la Maljuna pereis provante pristudi realtempe kaj surloke la okazaĵojn), en 79 p.K. terura erupcio de la itala vulkano Vezuvo – aŭ Vezuvio – detruis Pompejon kaj provokis grandan katastrofon en la ĉirkaŭa areo, kie kuŝis Herkulano mem.

**M**ulte da homoj mortis sukofate. Post la malkovro de la ruloj homoj nek aŭdacis, nek sukcesis iam ajn (ĝis antaŭ nelonge) ilin malfermi. Estis fakte tro granda la risko, ke tiu elvolva ago detruos por ĉiam la papirusojn kaj ilian potenciale altvaloran enhavon. Sed ni vivas en 2016, kaj komputiloj ege simpligas nian vivon, permesante aferojn, kiujn neniu estintecce imagus: do noviga teknologio finfine ebligis ciferece malvolvi la menciitajn papirusajn rulojn, konservante samtempe ilian integrecon kaj endanĝerigante ilin neniom!

## Esploristoj

Tiun ĉi operacion sukcesis lastatempe efektiviĝi internacia aro da esploristoj. Devenantaj precipe de Italio kaj Francio, ili fruktigis siajn diversajn kompetentojn rilate al fiziko, matematiko, inĝenierio, papirusologio, sed ankaŭ paleografio kaj klasika filologio. La esploro, freŝe aperinta en la revuo *Scientific Reports*, enplektis diversajn strukturojn, kiel *European Synchrotron Radiation Facility* en la franca urbo

Grenoblo, la tomografia laboratorio de *Nanotec-Cnr*, kies sidejo estas en Romo, la universitato *Tor Vergata* (ankaŭ en la itala ĉefurbo) kaj la universitato de Kalabrio, en la sudo de la itala duoninsulo.

## Iksoradia tomografio

Temas pri papirusa kolekto, kiu entute inkluzivas 1800 rulojn kaj kiu estis bonŝance savita post la erupcio de 79 p.K. La ruloj plejparte troviĝas en la Nacia Biblioteko de Napolo. Oni prave konsideras tiun kolekton el Herkulano la sola (kaj certe la plej grava) antikva libraro nun ekzistanta. Kadre de sendube kompleksa eksperimento oni elektis kaj analizis du papirusajn rulojn pere de evoluinta tekniko, bazita sur iksoradia tomografio kutime uzata en la medicina fako. Por la analizo de la donitaĵoj la fakuloj aplikis serion da specifaj algoritmoj kun la celo malvolvi la rulojn ciferece (sed ne reale, ĉar ili detruigis).

## Pliigita kontrasto

Tiu ĉi tekniko antaŭvidas la uzon de aparta lumo (tiu de sinkrotrono), kiu havas la kapablon pliigi la kontraston inter la skribaĵoj kaj la papirusoj. Tiel eblis pli simple lokalizi kaj priesplori

ilian tekston. Oni zorge do esploris la enan strukturon kaj skanis la skribaĵojn. La rezultoj, kiuj estis atingitaj danke al ĉi tiu kaj al kelkaj similaj pasintecaj eksperimentoj, malkovris signifan parton de teksto – skribita en la greka lingvo – ĝis nun ne observeblan tie ene.


## Sablo kaj ŝtonetoj

La legado de la greka teksto, senprobleme deĉifrita de la sciencistoj, donis voĉon al famaj helenaj filozofoj el la skolo de Epikuro kaj revivigis iliajn neniam aperintajn verkojn, kiuj en kelkaj okazoj estis nur parte konataj. Tiuj ĉi lastatempaj malkovroj povus revolucie ŝanĝi niajn konojn rilate al la historio de la antikva filozofio kaj de la klasika literaturo. Sed estas io plia: krom la konkretan enhavon de la papirusaj ruloj, la studado fare de la teamo de fakuloj akirigis ankaŭ aliajn gravajn informojn. Ekzemple, la cifereca malvolvado de la papirusoj montris ankaŭ la enan ĉeston de sablo kaj ŝtonetoj, certe ligitan kun la katastrofaj okazaĵoj, kiuj frapis Kampanion en la unua jarcento de nia erao.

**Cristina CASELLA**  
korespondanto  
de MONATO en Italio

# VERKO GRAVEDA DE VORTMAGIO

Precize antaŭ cent jaroj, en 1916, aperis la unua proza verko de Adriaan Roland Holst, kiu baziĝas sur la kelta mitologio: *Dirdri kaj la filoj de Usnaĥ*, verko graveda de brila vortmagio kaj sopiro je neatingebla, vento kaj maro. Ĝian 100-jariĝon oni intencas festi inter la literaturamantoj. Kiel esperantistoj ni kunfestu! – Christian Declerck majstre tradukis ĝin por ni.



Adriaan Roland Holst

**A**driaan Roland Holst (1888-1976) estas poeto nederlandlingva, kiu fojfoje verkis ankaŭ proze. Junaĝe, leginte poemaron de sia onklino, la poetino Henriëtte Roland Holst - van der Schalk (1869-1952), li subite konsciĝis, ke tion fari estas lia estonto: li devos fariĝi poeto.

Baldaŭ siajn unuajn poemojn li verkis kaj en 1908 li debutis en la revuo *De XXe eeuw* (La 20a jarcento), kiun redaktis la aŭtoro kaj kritikisto Lodewijk van Deysel. En 1910 sian unuan poemaron li sendis al eldonisto, kiu pro apogo de lia amiko la poeto P.N.

van Eyck akceptis kaj eldonis ĝin: *Verzen* (Versoj) – kiu aperis en 1911 – estas tre neegala poemaro, en kiu tamen jam klare reliefigas kelkaj el liaj ĉefaj temoj: la maro, la amo, la vivo kiel fremdulo inter la ceteraj.

En 1918 ĝis sia morto li loĝis sola en dometo apud la maro en la urbeto Bergen. Post lia morto tiun domon oni transformis en laborejon por laŭvice tie loĝanta kaj verkanta aŭtoro proza aŭ poeto.

### Mistika

En la 30aj jaroj aperis lia plej konata poemciklo *Een winter aan zee* (Vintro apud la maro), kiun en 1962 mi legis kun grandega admiro, tiom forta, ke tiun poemaron mi nepre volis mem posedi. Tamen pagi la libreton (tiutempe nur 1,50 guldenojn) mi ne povis, do mi ĝin mane kopiis. Preskaŭ samspire mi ankaŭ kopiis la romaneton *Dirdri kaj la filoj de Usnaĥ*: ankaŭ ĝi vere fascinis min. Mi apenaŭ povus vortigi kial, la lingvaĵo estas mistika, kun „grandaj vortoj”, bele strukturita rakontado, kun multe da simboloj, ofte ne estas klare, kion la simboloj indikas – minimume ili indikas ion grandiozan ...

Same kiel en multe da liaj poemoj, ankaŭ en *Dirdri kaj la filoj de Usnaĥ* lia lingvaĵo daŭre ates-

tas ian mitologian sopiron al sublimes, majesta sol-eco, iu estado inter vento kaj maro – neatingebla de ni kutime ĉiutagaj homoj. Dum jaroj, ekde la 30aj jaroj de la pasinta jarcento, oni ofte indikis lin kiel „la princon de niaj poetoj”, eĉ en taggazetoj – li ricevis ĉiujn literaturajn premiojn.

La 19an de novembro 2009 la tiama belga ĉefministro, kaj posta prezidanto de EU, Herman Van Rompuy, parkere citis en la Ĉambro de Reprezentantoj kvar versojn el la poemo *De ploeger* (La plugisto):

Ik vraag geen oogst; ik heb geen schuren,  
ik sta in uwen dienst zonder bezit.  
Maar ik ben rijk in dit:  
dat ik de ploeg van uw woord mag besturen  
Ik zal de halmen niet meer zien  
noch binden ooit de volle schoven,  
maar doe mij in den oogst geloven  
waarvoor ik dien ...

Rikolton mi ne petas, tenejojn ne havas,  
Mi servas ja vin sen posedaĵo,  
Sed mi riĉas en ĉi tio:  
ke la plugilon de via vorto mi povas stiri.  
La kulmojn mi ne plu vidos  
nek kunigos la plenajn garbojn,  
sed lasu min kredi je la rikolto  
por kiu mi servas ...

### Gerrit BERVELING

Adriaan Roland Holst: *Dirdri kaj la filoj de Usnaĥ*. El la nederlanda tradukis Christian Declerck. Eld. Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 1988. 52 paĝoj, vinktita. ISBN 90-71205-24-X.

Prezo ĉe FEL: 5 eŭroj + afranko.

# KRIZO NEKOMPRENITA



GENERATION GRÜNDEINKOMMEN

*La sviso Daniel Häni, iniciatinto de referendumo pri la senkondiĉa baza enspezo.*

En la jaro 2008 okazis mondskala financa krizo, kiun nur malmultaj antaŭvidis. Investintoj perdis grandegajn monsumojn kaj registaroj estis devigataj ŝuldiĝi por savi la bankan sistemon. Neniu komprenas kiel la samaj misinvestoj povis okazi ĉe preskaŭ ĉiuj bankoj, kaj ĝis nun neniu el la kulpuloj ricevis punon. Intertempe la regularoj iĝis pli severaj (kaj pli kompleksaj), sed la bankoj daŭre ofertas, eĉ altrudas, al siaj klientoj financajn produktojn, kies detalojn neniu persono kun meza instrunivelo kapablas kompreni.

**C**u la ekonomikistoj komprenas la ekonomion?

Ĝenerale ankoraŭ estas aplikata la ekonomia scienco de la pasinta jarcento kun la nov-liberalaj trajtoj aldonitaj dum la Thatcher-erao, kvankam

ĝi multflanke konfliktas kun novaj fenomenoj kiel tutmondiĝo kaj ekologio. Ĉu la mondfamaj ekonomikistoj nenion lernis el la pasinteco? Tion asertas Frank Niessen [nisen], kiu studis en la germana Aachen kaj loĝas en la belga Eupen, en sia libro *Entmachtet die Öko-*

*nomen! Warum die Politik neue Berater braucht* (Senpovigu la ekonomikistojn! Kial la politiko bezonas novajn konsilantojn).

Laŭ Niessen ekonomikistoj konsideras sian fakon scienco kiel naturscienco, kun ekzaktaj, netuŝeblaj aksiomoj,



dum ĝi reale estas socia scienco, influata de multegaj faktoroj. Multaj teorioj estas tro simplaj por esti utilaj en la reala vivo. En sia verko li faras proponojn por pli etika kaj sociala ekonomia sistemo.

## Daŭra ekonomia kreskado ne eblas

Jam en 1972 la *Klubo de Romo* en raporto atentigis pri la limigitaj stokoj de bazaj materialoj kiel energio kaj ercoj. Kvankam dum postaj jardekoj evidentiĝis, ke la reala situacio estas malpli maltrankviliga ol la prognozo, oni ĝenerale akceptas, ke la stokoj iam, en ne tro fora tempo, elĉerpiĝos, ĉar ĉiuj mondanoj deziras havi la vivkomforton de la „riĉaj” regionoj. Ŝparemo kaj reuzo de materialoj nur iom povas prokrastiti tion. Malgraŭ tio, politikistoj kaj ekonomikistoj (kaj ĵurnalistoj...) daŭre instigas al kreskado de la ekonomio, ĉar laŭ ili nur tiel solveblas problemoj kiel senlaboreco, socia sekureco kaj ŝtataj ŝuldoj. Ili pretervidas, ke en ilia lando plejparto de la bezonoj jam estas plenumitaj. La ekonomia kresko okazu en malriĉaj landoj, sed tiuj ne kapablas pagi la ofte altteknologiajn kaj multekostajn produktojn. Pli utilus al ili pli simplaj, malpli multekostaj produktoj, kiujn ili mem kapablas produkti.

En multaj evoluantaj landoj la politika situacio estas tiel malstabila, ke kresko de la ekonomio estas nur revo; la loĝantoj kontentas se ili sukcesas vivteni sin. Sed estas ankaŭ grandiganta grupo de antaŭe sufiĉe bonfartaj ŝtatoj, kiuj iom post iom forglitas en malriĉecon, ekzemple la sudaj landoj de Eŭropa Unio, aŭ kiuj perdis la esperon baldaŭ iĝi bonfartaj, ekzemple la landoj de orienta Eŭropo. Ilia progreso en iu momento kolapsis aŭ tute ne sukcesis. Ĉar ne estas aliaj solvoj, tiuj kiuj volas eskapi senlaborecon devas, leĝe aŭ neleĝe, migri al pli riĉaj landoj, kie ili plenumas malbone pagatajn taskojn

(kaj forpuŝas la tieajn malbonŝanculojn al senlaboreco). Cetero, eĉ en la plej riĉaj landoj de la mondo, ekzemple Germanio kaj Japanio, grandaj grupoj de la loĝantaro ja ne mortas pro malsato, sed tamen ne havas sufiĉan aŭ sufiĉe stabilan enspezon por dece vivi.

## Diskonigo kaj realigo de novaj ideoj ne facilas

Abundas etaj grupoj kaj politikaj partioj, kiuj volas pli-malpli draste reformi la ekonomian sistemon, sed ilia influo estas neglektinda. De tempo al tempo unu tia grupo havas allogan ideon kaj/aŭ sukcesas arigi grandan subtenadon, sed ĉiufoje ĝi post kelkaj monatoj aŭ jaroj, ofte pro interna kverelado, disfalas kaj perdas sian influon. Ekzemple pri la francdevena ATTAC, fondita in 1998, oni ne plu aŭdas, malgraŭ la nuna agitiĝo en Francio. La „Piratoj” en Germanio (*Piratenpartei Deutschland*) fondiĝis en 2006 kaj ankoraŭ ekzistas, sed ties bonaj ideoj forgesiĝis kaj intertempe venis *Alternative für Deutschland* kaj *Pegida*, kun aliaj ideoj. En Hispanio estas *Ciudadanos* (2006) kaj *Podemos* (2014). En la ĝeneralaj elektoj de 2015 ambaŭ akiris pli ol 10 % de la voĉdonoj. Kune ili estus influhavaj, sed individue ili estas malfortaj.

## Senkondiĉa baza enspezo

Jam de kelkaj jarcentoj ekzistas la teorio pri senkondiĉa baza enspezo, sed ĝis nun en la realo okazis nur kelkaj eksperimentoj. La ideo: ĉar en la nunaj strukturoj konsiderinda parto de la loĝantaro estas kaj restos senlabora, des pli, ĉar pro aŭtomatigo kaj saturado multaj laborfortoj ne plu estas bezon-



Senpovigu la ekonomikistojn! - Kial la politiko bezonas novajn konsilantojn (ISBN 978-3-8288-3623-5)

ataj, indus doni, sen iuj kondiĉoj, al ĉiuj loĝantoj bazan enspezon, sufiĉan por komforte vivi.

Unuavide la ŝtata buĝeto ne kapablas pagi tion, sed laŭ la poruloj grandegaj monsumoj iĝos disponeblaj, ĉar ne plu estos bezonataj administrado kaj kontrolado de senlaboruloj. Oni emas forgesi, ke ankaŭ multaj administrantoj kaj kontrolistoj perdos sian laboron kaj bezonos senkondiĉan bazan enspezon. Apenaŭ eblos prognozi la financajn konsekvencojn. La espero estas, ke en realo plejparto de la homoj tamen laboros (kvankam ili ne nepre devos), sed dum multe malpli da horoj kaj kun grandaj interrompoj.

La unua granda testo de la senkondiĉa baza enspezo estis referendumo en Svislando en la 5a de junio 2016. Ĝia ĉefa iniciatinto estas Daniel Häni, 49-jara entreprenisto. La proponita sumo estis 2500 svisaj frankoj (2250 eŭroj), sufiĉe multe, eĉ por lando kun altaj vivkostoj. En la voĉdonado partoprenis 45 % de la rajtigitoj; la poruloj atingis 23 % de la voĉoj. Ne estas venko, sed estas pli bona rezulto ol eĉ Häni antaŭvidis. Li kontentas, ĉar unuafoje la ideo estas grandskale diskutata, ne nur en Svislando.

**Roland ROTSZAERT**  
redaktoro de MONATO  
pri Ekonomio



# NACIIISMO KAJ PATRIOTISMO

Furiozas konfliktoj kaj bataloj inter ŝtatoj, nacioj, etnaj kaj religiaj grupoj en la mondo. Eĉ en okcidenta Eŭropo, kie oni iam konstatis alcentrigan progreson al internaciaj kunlaboroj kaj limigo de ŝtataj povoj, forte aktiviga movadoj decentrigaj.

En orienta Azio pluraj landoj engaĝiĝas en 19-jarcentecaj teritoriaj disputoj. En tiuj konfliktoj grandan rolon ludas naciismo, etno-centrismo aŭ patriotismo. Ĉi tie mi volus iom prezenti mian dubon pri la ĝenerala kompreno kaj taksado de naciismo kaj patriotismo, ofte paralele kaj kontraste pritraktataj.

Komence ni vidu la difinon de PIV, kiu priskribas naciismon: politika doktrino, kun miksitaj bazoj, laŭ kiu la nacia tradicio estas ĉiam preferinda, kaj la naciaj ambicioj ĉiam pravaj, kontraŭ tiuj de iu ajn alia nacio. Kaj pri patriotismo: amo al patrujo kaj inklino ĝin servi. Videblas, ke en mallongaj priskriboj jam aperas malfavora taksado pri „naciismo” kaj favora pri „patriotismo”.

Jen opinioj de konataj eŭropaj intelektuloj. En la libro *La Zamenhof-strato*, verkita de Roman Dobrzyński surbaze de interparoloj kun Louis C. Zaleski-Zamenhof, tiu ĉi diras: „Dum patriotismo konsistas el kultivado kaj protektado de sia kulturo, naciismo malrespektas la kulturon de aliuloj kaj altrudas al ili la sian. Tiamaniere la naciismo naskas ksenofobion kaj malamon.”

Samopiniante, Dobrzyński diras: „Naciisto konsideras ĉion sian la plej

bona, rezulte li ne toleras kiun ajn kritikon. Li simple ne interesiĝas pri la valoroj de aliuloj kaj tiel firmigas sian orgojlon.”

Eblas citi pli-malpli same el la verkaro de la brita verkisto kaj kritikisto George Orwell: „... patriotismo estas devoteco al aparta loko kaj aparta vivmaniero, kiun oni kredas la plej bona en la mondo, sed ne emas trudi al aliaj homoj ... Naciismo, aliflanke, ne estas disigebla de la deziro por potenco. La celo de naciisto estas atingi pli da potenco kaj pli da prestiĝo ... por la nacio aŭ alia unuo, kun kiu li elektis sin akordiĝi” (*Notoj pri naciismo*, 1945).

Evidentiĝas, ke eŭropanoj alte taksas „patriotismon” dum ili kritike taksas „naciismon”. Verŝajne tiuj taksadoj baziĝas sur ilia moderna historio, aparte sur spertoj kaj travivaĵoj dum la du mondomilitoj. Ili rigardas naciismon kiel la ĉefan motoron de la militoj, sed ne povas nei la ekziston de amo al sia naskiĝloko kaj sia kulturo. Rezulte estiĝis tia duala taksado.

Tamen estas dubinde, ĉu tiu duala taksado universale validas. Kvankam teorie povas esti utile kaj necese distingi tiujn du konceptojn kiel analizilojn, reale ne tiel distingeblas naciismo kaj patriotismo. La lasta facile transformiĝas en la unuan. El la vidpunkto kaj sperto de azianoj, naciismo kaj patriotismo, ambaŭ precipe modernaj nocioj, estas nedistingeblaj. Ekde la komenco ili preskaŭ kunfandiĝis.

En orienta Azio, precipe en Ĉinio kaj Japanio, tiuj sentoj de amo al sia pa-

trujo kaj kontraŭstaro al eksterlandoj naskiĝis, kiam ili rekte alfrontis invadon de eŭropaj imperiismaj landoj meze de la 19a jarcento. Memdefenda konscio kaj fiereco pri siaj historio kaj kulturo unuiĝis, kaj tuj fariĝis ŝovinismo aŭ ksenofobio.

En Japanio la miksaĵo de naciismo kaj patriotismo tuj naskis ŝovinismon kaj ekspansiismon, kaj antaŭenpuŝis agresajn militojn en Azio. Longe post la malvenko en la dua mondomilito, la vorto „patriotismo” en Japanio estis preskaŭ tabua, uzata nur inter dekstruloj. Naciismo estis rigardata kiel neŭtrala, objektiva.

Ni ofte vidis, ke en multaj landoj regantaj politikistoj ekspluatas kaj inspiras patriotismon al sia popolo por nebuligi ĝiajn okulojn kaj forturni ĝin de la malfacilaĵoj kaj mizeroj de la socio, kiujn oni atribuis al alilandanoj.

Estas tute nature, ke homoj, kiel individuoj, havas amon al siaj patrujoj kaj kulturo, sed ĝuste tiam, kiam tia amo estas publike esprimata en la formo de kolektivaj sentoj kaj ismo, ĝi fariĝas trudemaj naciismo aŭ ŝovinismo.

Mi citu fine la vortojn de du intelektuloj. „La patriotismo estas forta ideologia subtenilo de la reganta klaso” (Lanti, la fondinto de Sennacieca Asocio Tutmonda), kaj „Patriotismo estas la lasta rifuĝejo de kanajlo” (Samuel Johnson, 18a-jarcenta brita eseisto kaj leksikografo).

ISIKAWA Takasi  
korespondanto  
de MONATO en Japanio



## ANONCETOJ

**MONATO** serĉas ankoraŭ kelkajn reviziantojn. La tasko de la reviziantoj estas trovi lingvajn erarojn (ekz. la malbonan frato) kaj komposterarojn (ekz. Espernato) kaj komuniki la erarojn al la eldonejo. Ĉiu revizianto ricevos meze 10 tekstojn monate, kio egalas al ĉ. 20 000 signoj. Kandidatoj bv. anonci sin kun konciza priskribo de siaj spertoj ĉe [monato@fel.esperanto.be](mailto:monato@fel.esperanto.be).

**Vizitu Ipernity**, la socian retejon, kie Esperanto estas unu el la plej ofte uzataj lingvoj. En ĝi kelkaj miloj da Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al [www.ipernity.com/?lg=eo](http://www.ipernity.com/?lg=eo) Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

**Retbutiko.net** donas al vi multe pli da serĉ-ebloj ol antaŭe. Vi povas tuj serĉi el la adres-trabo de via foliumilo (Firefox, Chrome, Explorer, Safari ktp). Ekzemple tajpinte [retbutiko.net/trovu/Steele](http://retbutiko.net/trovu/Steele) vi tuj trovos ĉiujn verkojn de Trevor Steele, tajpinte [retbutiko.net/trovu/politiko](http://retbutiko.net/trovu/politiko) vi trovos ĉiajn verkojn pri politiko, aŭ post tapado de [retbutiko.net/trovu/internacia](http://retbutiko.net/trovu/internacia) vi trovos ĉiujn verkojn kun la vorto „internacia“ en la titolo. Elprovu tuj kiel facila tio estas!

**“Naturista Vivo”**, la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga prov-ekzemplo. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: József Németh, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: [jozefo.nemeth@gmail.com](mailto:jozefo.nemeth@gmail.com).

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro\* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj\*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al [http://www.esperanto.be/fel/mon/mon\\_anon.php](http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php).

\*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

# La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR  
aere 43 EUR  
rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA,  
UFE, EAB, SEF kaj  
dudeko da aliaj landaj  
perantoj

Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

# LA GAZETO

## MONDKULTURA SENDEPENDA ESPERANTISMA

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO  
12, sous la Ville, 55210 Creuë (Francio)

[lagazeto@osiek.org](mailto:lagazeto@osiek.org)

<http://www.lagazeto.com>

# La KancerKliniko


Politika Kultura Skandalema Ajnista  
4 numeroj jare + La Krom

[ikk@free.fr](mailto:ikk@free.fr)

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc  
Goninaz, Manuel de Seabra, Kris Long,  
Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn,  
Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy,  
Gennadij Turkov, Sen Rodin,  
Russ Williams, Stéphan Brault,  
Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, ktp.

Abono: 27,50 € (ekde 16 en kelkaj landoj)  
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris  
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp

# En Flandraj Kampoj



---

**Neniu poemo el la Unua Mondmilito estas tiel konata kiel 'In Flanders Fields' de la Kanada armeokuracisto John McCrae.**

**Afliktita de la hororo de la milito li verkis ĝin je la 3a de majo 1915 ĉe sia flegejo inter leper kaj Boezinge.**

---

La bruĝa aŭtoro Herwig Verleyen prilumas en tiu ĉi bone dokumentita eldono la vivrakonton de John McCrae kaj la estiĝohistorion de 'In Flanders Fields'.

Li klarigas kiamaniere la poemo evoluis ĝis mondvasta simbolo de ofero kaj batalo por la paco kaj kiamaniere la papavo (poppy), nomita en la poemo, fariĝis la simbolo de ĉiuj pereintoj.

Finfine la leganto konatiĝas kun tio, kio en Flandrio kaj ankaŭ eksterlande memorigas je John McCrae kaj lia poemo.

Amplekso: 68 paĝoj  
Prezo 9,95 eŭroj + afranko  
Aŭtoro Herwig Verleyen  
Aperis 2015